

HORIZONTO

IV-a JARO N-o 23 (5)
SEPTEMBRO - OKTOBRO 1979

KULTURA KAJ INFORMA REVUO



Strasburgo
Eŭropo-Palaco

PLIA KONTRIBUO AL LA PARTIPOLITIKE NEŬTRALA ESPERANTISMO

B E L E T R O

EŬROPO EN STRASBURGO

DE LA NEŬTRALA ESPERANTO MOVADO

HORIZONTO

Direktorino
Inés Gastón
Redakta Komitato
Salvador Gumá
Juan Régulo
Jean Thierry
Red. kaj Adm.
Inés Gastón
P.º Marina Moreno, 35
Telf. (976) 22.05.21
Zaragoza-1 (Hispanujo)
Eldonkvanto 1.000 ekzempleroj
Dumonata revuo
Presita en Zaragoza
ĉe "Tipografia C. Boloix"
str. Reina Fabiola, 7, Zaragoza-8
Leĝa Depono Z-133-76

N.º 5 - Septembro - Octobro 1979

ENHAVO

PLIA KONTRIBUO AL LA PARTIPOLITIKE NEŬTRALA ESPERANTISMO

Raporto de la 5-a Internacia Konferenco de N.E.M.

OPINIO DE OBSERVANTO (G. Salan)

FOR! LA MITOJ KAJ LEGENDOJ PRI LANDNOMOJ (A. Albault)

KELKAJ ASPEKTOJ PRI LINGVOPROBLEMOJ EN LA MULTNACIAJ GRUPOJ (Jean Thierry)

EUROPO EN STRASBURGO (1949-1979)

BELETRO

Omaĝe, al ses junaj katalunlingvaj poetoj (G. Mora i Arana)

La temp' apenaŭ (trad. J. L. Tortel)

FATALO? (Jan Smykalski)

REZOLUCIO DE LA 5-a INTERNACIA KONFERENCO DE NEM (La Prezidantaro)

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED) Redaktas (Ivo Lapenna)

PRI LA LANDNOMOJ (S. Gumà)

EL NIAJ FAKAJ ORGANIZAJOJ

Nova numero de Internacia Jura Revuo

KIEL ABONI?

Abonojn al "Horizonto" akceptas la Administracio: Inés Gastón, Paseo Marina Moreno, 35, Zaragoza-1, Hispanujo. Pĝk. Zaragoza 00428398 (Jarabono 000 ptoj.), aŭ la sekvantaj.

PERANTOJ

Aŭstrujo:
Dro. Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 GRAZ. Pĝk. Graz 1257.845. Jarabono: 160,— S.

Britujo:
Geoffrey King, 14 Elmdale Road, LONDON N13 4UL. Pĝk. 37.507.9106. Jarabono 5 £.

Danlando:
Peter Zacho, Nørregardsvej 91, DK-2610 RØDOVRE, Pĝk. 6287859. Jarabono: 60,— D Kr.

Finlando:
Finna Esperanto-Librejo, PL 221, SF-70101 KUOPIO 10, Pĝk KU 152801-5. Jarabono: 38,— F. Mk.

Francujo:
André Bourdeaux, 91 rue de la Chapelle, F-75018 PARIS. Pĝk. Paris 21.670.96 V. Jarabono: 40,— Fr.

FR Germanujo:
Heinrich Müller, Mommsenstrasse 5, D-3000 HANNOVER 1. Pĝk. Hannover 120 854-301. Jarabono: 24,— DM.

Grekujo:
Adda Sakelaropoulou, Sokratous 88 Omونيا, ATHENO 101. Jarabono: 380,— Grekaj Drakmoj.

Israelo:
Ben-Alter Jehiel, P. O. B. 379, PETAH TIKVA. Pĝk. Bank Hadoar, 4-45854-8. Jarabono: 84 izr. liroj.

Jugoslavio:
D-ro Oton Pancer, Voćarsko Naselje 10, YU-41000 ZAGREB. Jarabono: 180 n. din.

Kanado:
Kriss Smilga, 34 Martin Road. TORONTO Ont. M4S 2V2. Jarabono: 10,— \$.

Luksemburgo:
Wickler Albert, OLM. Pĝk. 54175-49. Jarabono: 380 lfr.

Rumanujo:
Mihail Petre Dungeanu, P.O. Box 502 R-5806 SUCEAVA.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al unu el tiuj perantoj, ĝis peranto en tiu lando estos trovita. Personoj pretaj funkcii kiel perantoj, bv. sin turni al la direktorino.

PLEJ GRAVAJ VERKOJ

Eldonejo: PLAZA & JANES, S. A.
ESPLUGAS DE LLOBREGAT
(Barcelona - Hispanujo)

PLIA KONTRIBUO AL LA PARTIPOLITIKE NEŬTRALA ESPERANTISMO

(Laŭ la Protokolo verkita de Mag. K. Zaĥarakis)

Verŝajne neniu el la ĝisnunaj Konferencoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado estis tiel sukcesa el vidpunkto de efika laboro kaj pozitivaj rezultoj, kiel la Kvina, okazinta en Ateno de la 8-a ĝis la 15-a de Septembro. Seriozaj, altnivelaj diskutoj pri la fundamentaj problemoj de la nuntempa Esperanto-Movado, precizigoj rilate la pozicion de la Neŭtrala Esperanto-Movado (N.E.M.), konkretaj utilaj proponoj por plua agado prezentas plian tre gravan kontribuon al la partipolitike neŭtrala esperantismo, inspirita de la zamenhofa homeco kaj eksterpolitika internaciismo.

La konferencejo — la tre taŭga Studenta Domo en Str. Patisiou 217 — estis senpage disponigita de la edukaj aŭtoritatoj. Tie, en la granda salono, sabaton vespere la konferencanoj renkontiĝis en agrabla kaj amika atmosfero de la interkona vespero. Abunda bufedo kaj refreŝigaj trinkaĵoj eĉ pli agrabligis la kunestadon.

La inaŭguro

Dimanĉon matene komenciĝis la laboro. «La antikvaj Helenoj diradis: 'Ne en la multo estas la bono, sed en la bono estas la multo'. Ni, havante inter ni Profesoron Lapenna, certe reprezentas la bonon.» Per tiuj vortoj ĉefkomitatano S. Sakellaropoulos komencis sian salutparoladon, en kiu li mallonge skizis la signifon de la Konferenco. Laŭ lia propono estis unuanime elektita jena Konferenca Prezidantaro: Prezidanto Prof. Dro Ivo Lapenna (Britio); Viciprezidantoj Prof. Dro S. Anagnostakis (Grekio), Mag. I. Dratwer (Israelo), Advokato G. Grinistsos (Grekio), Prof. Dro O. Pancer (Jugoslavio); Sekretario Mag. K. Zaĥarakis. Prof. Lapenna dankis en la nomo de la elektitoj kaj akcentis, ke ĉi-foje escepte, pro tute specialaj kaŭzoj, li akceptas la prezidantecon nur de tiu ĉi Konferenco.

Tuj post tio sekvis la enkonduka preleĝo de Prof. Lapenna pri «La Perspektivoj de Esperanto en la Nuntempa Mondo kaj la Situacio en la Esperanto-Movado». En la unua parto la preleginto prezentis diversajn aspektojn de la daŭre akriĝanta lingva problemoj en la internaciaj rilatoj sur ĉiuj niveloj. En la dua parto li emfazis la maturecon de la Internacia Lingvo (Esperanto), ĝian konstantan evoluon surbaze de la Fundamento, ĝian kulturan valoron kaj plenan potencialan taŭgecon por kontentigi la nuntempajn bezonojn de internacia lingva komunikado. Tio estas nia plej granda kaj potenca armilo. La malforto estas la profunda krizo, kiun spertas la tuta Esperanto-Movado pro la konataj eventoj dum la U.K. de Hamburgo en 1974. Tiun demandon la preleginto pritraktis en la tria parto kaj konkludis, ke ĝuste pro tiu krizo, kiu interalie perdigis al U.E.A. unu kvinon de la plej valora individua mebraro kaj pasivigis multajn pliajn, la nuna U.E.A. ne estas kapabla utiligi la escepte favorajn eksterajn kondiĉojn por decide progresigi la lingvon.

La diskuto tuj komenciĝis per interveno de Sro S. Sakellaropoulos. Li aparte emfazis la ŝancojn de Esperanto en Eŭropo, precipe pro la formiĝo de la Eŭropa Parlamento post la rektaj elektoj de la deputitoj en la ŝtatoj-membroj. Li ankaŭ donis plurajn ekzemplojn de incidentoj: jam en la unua kunsido de la Eŭropa Parlamento italaj deputitoj brue protestis, ĉar unu el ili alparolis france la parlamentanojn. Rilate la situacion en U.E.A. li esprimis la deziron kaj esperon, ke fine en ĝia Komitato ekregu prudento.

Diskutoj pri la Agadoj de N.E.M.

Dum tri kunsidoj de pluraj horoj la Konferenco detale preparolis la enkondukan prelegon de Prof. Lapenna, la agadojn de diversaj agadgrupoj kaj aktivuloj, la situacion kaj rolon de «Horizonto» kaj aliajn konkretajn demandojn. En la diskutoj partoprenis multaj el la konferencanoj, inter kiuj ankaŭ Mag. I. Dratwer, Mag. A. Dratwer, Prof. O. Pancer, Dro K. Perko, ges-roj S. kaj A. Sakellaropoulos. F-ino M. Vermaas, S-ro G. Konrad, S-ino M. Müller, Prof. I. Lapenna, Mag. K. Zaĥarakis, k.a. Esprimiĝis ĝenerala opinio, ke la agadoj de N.E.M., inkluzive ĝiajn konferencojn kaj publikaĵojn, jam ludis pozitivan rolon kaj pluraj signoj indikas, ke tiu rolo fariĝos eĉ pli sentebla en la estonteco. La esperantistaro ĉiam pli kaj pli komencas malfermadi la okulojn kaj vidi la realaĵon.

Aparta atento estis dediĉita al *Horizonto*. La ĝenerala linio de la periodaĵo estas tre kontentiga kaj F-ino Inés Gastón, kune kun la tuta redakcio, meritas grandan rekonon kaj dankon. Pluraj diskutantoj esprimis la deziron, ke la primovadaj artikoloj estu pli emfazitaj (presitaj per pli dikaj literoj, preferu sur la unuaj paĝoj, tiel ke la literaturaĵoj sekvu post tiuj gravaj artikoloj); ke oni eĉ pli atentu al la pureco de la lingvo laŭ la Fundamento; ke sur la antaŭlasta kovrilpaĝo daŭre aperu koncizaj informoj pri N.E.M., la kaŭzoj de ĝia estiĝo, ĝia celo kaj ĉefaj agadoj, tiel ke la novaj abonantoj estu korekte informitaj. Oni unuanime decidis rekomendi al la administracio altigi la abonojn je 20 %, kio certigos daŭran regulan publikigadon malgraŭ la inflacio. Laŭ propono de Prof. Lapenna pluraj konferencanoj tuj kontribuis por aparta novjara donaco al *Horizonto*. La rezulton de tiu agado v. sur p. de tiu ĉi n-ro.

Estis faritaj pluraj proponoj pri la loko de la *Sesa Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado*. Principe estas decidite, ke, se iel eble, ĝi okzu en Strasburgo fine de julio kaj komence de aŭgusto 1980. S-ino M. Müller esploras la eblecojn rilate taŭgan konferencejon kaj interkonsentos kun Sro Jean Thierry kiel gvidanto de la Franca Agadgrupo de N.E.M. pri la detaloj. F-ino M. Vermaas, siatempe Direktorino de la C.O. de U.E.A., promesis administran helpon.

Unu tutan laborkunsidon okupis la pritrakto de la *Rezolucio*. La definitiva teksto, unuanime akceptita, aperas aparte.

Prelegoj

Tri el la kvin prelegoj okazis mardon matene.

Prof. I. Lapenna parolis pri la «Fina Akto de Helsinki». Li analizis ĝian enhavon kaj juran karakteron, precipe rilate la homajn rajtojn kaj fundamentajn liberecojn. La preleginto emfazis, ke la Akto, kvankam per si mem jure nedeviga, tamen havas grandan etikan kaj moralan valoron. La prelego estis bazita sur liaj ampleksaj studoj publikigitaj en la angla kaj sur artikolo aperinta en *Internacia Jura Revuo*.

Prof. S. Anagnostakis prelegis pri «La Jura Puno laŭ Aristotelo» okaze de la celebritaj 2300 jaroj de la granda helena filozofo. Lia prelego aperos aŭ en *Horizonto* aŭ en *Internacia Jura Revuo*.

Advokato G. Grintsos prezentis la ĉefajn celojn, strukturon kaj agadojn de Amnestio Internacia. Lia prelego estos publikigita en *Internacia Jura Revuo*.

S-ro S. Sakellaropoulos prelegis jaŭdon pri «La Morto en la Scienco kaj Filozofio kun Ekiro de Maeterlink kaj Platon en Lia Verko Fedon». La ideoj de la preleginto estas prezentitaj en la Epilogo de lia freŝdata verko *Fedon* de Platon.

Jam pli frue en la semajno, dum unu el la laborkunsidoj, *S-ro G. Konrad* prelegis pri la «Modernaj Metodoj de Varbado». Li donis multajn ekzemplojn de trafaj kaj allogaj manieroj altiri la publikon, interalie per kombino de nekutimaj koloroj de varbfolioj, taŭgaj desegnaĵoj, selektitaj sloganoj, kontrastoj, ktp. La kunveno konsilis al la preleginto resumi la enhavon kaj prezenti tiel koncizigitan tekston al la redakcio de *Horizonto* por eventuala publikigo.

Kunveno de juristoj

La jara kunveno de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj okazis mardon posttagmeze. Notinde estas, ke la kunvenon ĉeestis tri el la kvar estraranoj de tiu grava faka organizaĵo, fondita jam en 1957. La nombro de membroj kaj abonantoj denove iom kreskis. La kunveno akceptis la Estraran Raporton, prezentitan de la sekretario-kasisto, *Dro K. Perko*. La konto montris malgrandan gajnon kaj oni decidis utiligi ĝin por pago de kotizoj por kolegoj, bonaj konantoj de Esperanto, en landoj, el kiuj estas praktike maleble sendi monon eksterlanden por tiaj celoj. Oni ankaŭ decidis, ke la membro-kotizo kaj abono restu la samaj, kiel ĝis nun, nome 120 aŭstriaĵ silingoj. Ĉiuj decidoj estos submetitaj al skriba voĉdono de la tuta membraro, kiel en la pasintaj jaroj. Pli detalaj informoj pri la kunveno aperos en *Internacia Jura Revuo*.

Kultura Programo

La kultura kaj distra parto de la programo estis riĉa kaj interesa. Dimanĉon vespere okazis vizito al la t.n. «Festo de la Vino» en belega parko en la tuja proksimeco de Ateno. Tie la konferencanoj povis senpage gustumi tiom da plej altkvalitaj grekaj vinoj, kiom ili deziris, aŭ kunporti ilin en kruĉoj al siaj tabloj en la restoracioj por trinki dum la manĝado de «musoko» kaj aliaj grekaj specialaĵoj. Landon vespere la konferencanoj veturis per aŭtobusoj al la fama Sunion. Tuj poste okazis luksa akcepto en la gastama apudmara domo de *S-ino Anna Andreatu* en la vilaĝo Porto-Rafti. En plej kora atmosfero la konferencanoj ĝuis la kunestadon ĝis malfrua nokto. Mardon vespere ĉiuj havis rezervitajn biletojn por la impresa programo «Sono kaj Lumo» sur Akropolis, en kiu per voĉoi, sonoj kaj lumaj efektoj estis prezentita la historio de tiu koro kaj cerbo de la antikva Ateno, precipe de la epoko de Periklo. Merkredon okazis tuttaga ekskurso al la orakolejo Delfi kaj jaŭdon vespere, denove sur Akropolis, oni povis admiri la folklorajn dancojn de *Dora Stratu*. Fakte, unu memorinda evento post alia.

Intervjuo ĉe la Greka Radio

La Greka Radio intervjuis *Prof. I. Lapenna* kaj *S-ino Ada Sakellaropoulou*. Ili respondis al demandoj pri Esperanto kaj la Esperanto-Movado ĝenerale, pri N.E.M. kaj ĝia 5-a Konferenco, pri la disvastigiteco de Esperanto en la mondo, en Eŭropo kaj, speciale, en Grekio.

La intervjuo estis disaŭdigita dum speciala vespera programo kaj elvokis kontentigan interesigon.

Finaj Vortoj

La interkonan vesperon kaj la dimanĉan prelegon de *Prof. Lapenna* ĉeestis ankaŭ *S-ro Migas*, la nuna vicprezidanto de Helena Esperanto-Asocio, aliĝinta asocio de U.E.A., kiel observanto. Invitita de la prezidanto esprimi sian opinion pri la prezentitaj faktoj kaj konkludoj, li deklaris, ke li ĉeestas nur kiel observanto kaj preferas ne alparoli la Konferencon, sed li promesis objektivite informi la Estraron de H.E.A. pri ĉio prezentita en la prelego kaj en la debato. Espereble tio helpos al mildigo de la krizo almenaŭ en Grekio.

En la ferma kunsido la prezidanto dankis per kortuŝaj vortoj al ĉiuj membroj de la Organiza Komitato, tute aparte al *Ges-roj Sakellaropoulos*, pro ilia sindona laboro, granda helpo donita al konferencanoj, bonegaj kulturaj programoj kaj senfina ĝentileco. Li transdonis al *S-ino A. Sakellaropoulou* grandan bukedon da rozoj kiel signon de danko de la Konferenco al ŝi kaj al la membroj de la Organiza Komitato.

En la ĉi-suba teksto d-ro G. Salan, laŭ propra formulo «*kiel laŭtparolilo de la tuta UEA-a silenta plimulto*», esprimas opinion, laŭ kiu la plej bona reago al la puĉo de Hamburgo estis resti en UEA por kontraŭbatali deinterne la imperiisman premon de la komitatoj el la sovetisma bloko.

Tia vidpunkto, kiu emas preni asocion por patrio kaj skandaligi ĉe la rompo de l'umbilika funiklo fare de iu membro, tre ofte venas de homoj, kiuj ankorau ne plene konscias pri la cenzuro reganta en UEA. Por kio servas resti en respondeca posteno de supera instanco, kiu malebligas ĉian publikigon de ideo nekonforma al la idearo de la superreganta frakcio? Kiu silentas eĉ kontraŭvole, tiu konsentas: kaj kiu restas en tiaj kondiĉoj, tiu «*jam klinas la kapon*»!

Fakto estas, ke ĝis nun neniu sukcesis deinterne prezenti ian kritikon; eĉ d-ro G. Salan mem povis konigi siajn ideojn nur proprakoste per eldono de persona broŝuro. Kio pravigas per si mem la ekziston de NEM ankaŭ «*kiel laŭtparolilo de la tuta UEA-a silenta plimulto*».

Tute ne temas pri «*memama vundo*» nek pri «*sekta movado*» sed ja pri fortostreĉo kontraŭ iu speco de intelekta terorismo manifestiganta per ia skollastiko, ekster kiu ne estas «savo».

Tiel ĉu efektive ne notas d-ro G. Salan, ke, ĉar «*tute silentis*» lia nacia Esperanto-Asocio, «*sendube ĝia prezidanto samideano Hervé Gonin timas sin kompromiti*»? Jen sen libereco de esprimado floras pro timo nur silento aŭ masko, se ne ofte ambaŭ!

Jean Thierry

OPINIO DE OBSERVANTO

Parolado de D-ro George Salan
okaze de la IV^a I.K. de NEM

Ŝatataj gesamideanoj,

Mi partoprenas ĉi Konferencon kiel observanto.

Observanto? Kion tio signifas? Ĝi signifas, ke kvankam mi admiras la talenton de D-ro Lapenna, kiu estas je miaj okuloj, la Unua Esperantisto de l' Nuntempo, kvankam mi havas nenion kontraŭ la kreo kaj la ekzisto de NEM, mi ne aprobas la ekzigon de ties gvidantoj el UEA.

Sed pri tiu temo mi parolos post momento.

Notu tamen tuj, ke se mi veturis al Jaca, kvankam ne NEM-ano, mi, kvankam UEA-ano, ne veturas al Varna, ĉar mi ne emas veturi al lando, kie la homaj rajtoj ĝemas en katenoj.

Ĉar samideano Thierry en sia hieraŭa prelego aludis pri broŝuro de mi subskribita, mi nun parolos pri mia koncepto de neŭtraleco.

Sed ĉar malmultaj el vi min konas, mi komencos ĉi-mallongan raporton pere de kelkaj biografiaj informoj.

Mi eklernis Esperanton dum la jaro 1923. Tiuepoke mi kuŝis en soldata hospitalo pro spina akcidento, kies resaniĝo daŭris pli longe ol antaŭvidite. Tial mi eliris el la hospitalo nur dum la jaro 1925. Tiam mi tuj eklernis medicinan arton kaj samtempe propagandis Esperanton. Mi devas aldiri, ĉar tre gravas por bona kompreno de la sekvaj paĝoj de mia raporto, ke mi tiumomente estis kompartiano kaj SAT-ano.

Dum la jaro 1927 mi estis la sola franca esperantisto invitita de Centra Komitato de Sovetrespublikara Esperanto-Unio por partopreni la 10-an datrevenon de l' Oktobra Revolucio.

Dum 1930-a jaro mi estis eksigita el SAT pro komunismo, kaj dum la jaro 1935-a mi estis eksigita el franca kompartio pro antistalinismo kaj esperantismo. Mi do povas diri, sen troa troigo, ke oni min eksigis el Esperantio pro komunismo kaj el kompartio pro esperantismo.

Sekve de kio mi, iun tagon, staris surstrate tute sola kaj tute nuda.

Feliĉe mi intertempe estis fariĝinta medicindoktoro kaj daŭre vivis en mi interna idearo.

De tiam mi tute forlasis politikon kaj Esperanton, kaj kvazaŭ kabeiĝis ĝis la jaro 1973, t. e. dum 38 jaroj.

Jes, dum preskaŭ mia tuta aktiva vivo, krom la deknunaj jaroj de tiu vivo, mi sidis for de la esp.-movado kaj nur okupiĝis pri medicina arto.

Mi tamen aldiru, ĉar ĝi eble iom gravas, ke dum la lasta mondmilito mi estis deportita en plurajn naziajn koncentrejojn. Pro kio mi povis kulpi? tute simple pro homarantismo.

Kvazaŭ hazarde, ĉar mi trovis Esperanto-libron en mia biblioteko, mi ree esperantistiĝis dum la jaro 1973, kaj partoprenis Hamburgan Kongreson dum 1974. Tie, unuan kaj lastan fojon, lastan ĝis antaŭhieraaŭ, mi aŭdis Ivo Lapenna parolantan ĉe tribuno, kaj mi estis ege impresita. Impresita sed samtempe turmentita de lia deklaro, ke li forlasas la UEA-vicojn kaj sin mem eksigas el UEA.

Tiun sintenon mi nek aprobis, nek aprobas, sed pri tiu temo mi parolos poste.

Nun pri mia broŝuro.

Ĉar malmultaj el vi havis okazon ĝin tralegi, mi tre larĝtrajte sciigos vin pri la enhavo de

«UEA kaj la neŭtraleco»

Ĝi fakte entenas la kvar sekvajn nociojn.

1) La naciaj esp.-asocioj de l' t. n. socialismaj landoj ne estas kaj ne povas esti neŭtralaj, ĉar konstitucie ĉiuj kiuj en tiuj landoj deziras unuiĝi devas esti kompartianoj aŭ kredigi, ke ili simpatias al kompartio. Do ili ne estas neŭtralaj tute simple ĉar ili laŭleĝe ne povas esti tiaj.

2) Esperantisto ne povas esti kompartiano. Esperantisto estas ja socia idealisto, kiu kredas al homa saĝo, interpopola amikeco kaj Zamenhofa homaranismo. Dume kompartiano estas homo, kiu kredas al komunismo kaj al nenio pli.

3) La kompartiaj esperantistoj tre klare konscias, ke en la t. n. socialismaj landoj, kiu ne aliĝas al kompartio estas nenio, kaj tial ili kompartianiĝis, sed ili *unue* estas kaj sin sentas esperantistoj. Se ne, kial do, por kiu profito ili esperantistiĝis?

Povas esti, ke iliaj ĉefoj konsistigas escepton el tiu regulo, kaj ke, kiel skribis al mi samideano el Londono responde al mia broŝuro, «ili kontraŭ «pago» de la partia fideleco, «aĉetis» la eblecon vojaĝi tra la mondo al la Kongresoj de UEA kaj aliaj eventoj. Se ili ne farus la laboron de la Partio, ili ne havus tiujn avantaĝojn» (fino de citaĵo).

Sed la ĉefoj ne estas multnombraj, dum tiaj estas la bazaj esperantistoj, kaj mi estas certa, ke malmulte, se ne tre malmulte da tiaj bazaj esperantistoj havas enpoŝe la partian membrokarton.

4) Ni do ne devas timi orienteŭropajn esperantistojn. Sed kion pensi pri la asocioj al kiuj ili aliĝas?

Tiuj asocioj klopodas eble frakcii UEA-on. Sed, kiu el vi ne konscias, ke tiuj klopodoj plene sukcesos nur, se iam venos tempo de submetado de tuta Okcidenteŭropo sub la jugo de sovetia imperiismo? Kaj se alvenos tiu tempo, ni ĉiuj klinos la kapon.

Emfazante, ke ĉiu esperantisto estas nia amiko, se ne nia frato, mi konkludas, ke ni ĉiuj devos ĉu resti en, ĉu reveni al UEA por tie reprezenti kaj defendi nian idealon.

Mia broŝuro finiĝas pere de tiu atesto:

Interna Ideo daŭre vivas kaj vivos.

Nune mi rapide notu la reagojn al tiuj nocioj.

Inter ili mi distingas la oficialajn kaj la individuajn.

La esprimitaj oficialaj venis de NEM, de francaj kaj germanaj esperantistaj komunistoj, kaj de la revuo de UEA: «Esperanto».

La unua el NEM-reagoj, la plej longa el ĉiuj diversflanke ricevita, tre drasta, venis de Jean Thierry, kiu, interalie, tiele min akuzis: «D-ro Salan, vi jam klinis la kapon». Ne, estimata samideano, mi dume ne klinis la kapon.

La dua NEM-a reago venis de D-ro Lapenna, multe pli afabla ol tiu de Thierry. Sed mi ne parolos pli longe pri ĉi NEM-reagoj, ĉar Thierry kaj D-ro Lapenna, tie ĉi-ĉeestantaj, havas ĉiujn eblojn laŭplaĉe reagi.

La monata gazeto de l' francaj esperantistaj komunistoj «La Esperantista Laboristo» publikigis en sia februara numero pervitriolan recenzon. Ĉar ĝi estas kurta, vi permesos al mi ĝin laŭvorte tralegi.

«ANSTATAŬ RECENZO...

D-ro G. Salan, aŭtoro de «la Nuda Ver», verkis broŝuron sub titolo «UEA kaj la neŭtraleco», kies antikomunismo ŝajne situas ne je la nivelo de la cerbo, sed je tiu de la intestaro. Imagu, do, ke kvankam komunistoj-esperantistoj ne povas esti veraj komunistoj, tiuj maliculoj intencas, aŭ «devus intenci» (!) formanĝi UEA. Tremu, Samideanoj! Sendube, tia broŝuro ne meritas recenzon. Tamen utilas substreki, ke Salan estas majstro en la arto akumuli tiom da malveroj kaj troigoj sur tiom malmulte da paĝoj. La hitleraj koncentrejoj probable ekzistus ankoraŭ sen la decida rolo de Sovetunio en la 2-a mondmilito; ĉu li jam forĝis kaj forbalais tion? Kaj ne troveblas en lia broŝuro eĉ vorteto kon-

traŭ la nemezureblaj krimoj de la imperiismo, de la nekoloniistoj, de la faŝistaj reĝimoj. En la nomo de «homaranismo» kaj de la «interna ideo»! W. G.

Tamen ne pervitriole reagis tiu, kiun oni kutime konsideras kiel la plej aŭtoritatohava kaj la plej kompetenta el la nuntempaj kompartianaj esperantistoj, nome Doktoro Detlev Blanke, el GDR.

En letero al mi adresita, li ja opinias:

1) Ke mia broŝuro estas en sia speco tiom originala, ke per racio ne eblas ĝin prikomenti.

2) Ke mi faras al mi la aferon tro simple, tiom simple, ke malfacilas sekvi.

3) Ke por surpiedigi miajn sunkapajn argumentojn, mankas al li tempo.

4) Ke fine plej mirigas lin miaj «eksplikoj», kiuj supozigas la jarojn de la «malvarma milito».

Ĉu decas komenti? Mi nur diru, ke ĉe kompartiaj ĉefoj stalinismo ankoraŭ ne mortis.

Laŭ la revuo de UEA, «Esperanto», tiu broŝuro esprimas nur la politikan konvinkon de unuopa esperantisto!!

Unuopa, ĉu vere?

Tion mi ne kredas. Mi multe pli emas kredi, ke en tiu okazo, mi funkciis kiel laŭparolilo de la tuta UEA-a silenta plimulto. Tion pravas al mi la bazaj reagoj, kiujn mi ricevis. Mi povas aserti, ke neniu el la kvindek da bazaj respondoj, kiuj min trafis, malkonsentas kun miaj diroj. Kaj mi estas certa, ke se la tribuno de «Esperanto» kaj de «Heroldo» ne estus fakte fermitaj al la bazaj esperantistoj, aŭ ke, se ĉiu baza esperantisto povus je propra kosto eldoni siajn pensojn, ili je granda procento subtenus mian agadon.

Ili dirus, ke la UEA-anoj ne estas sufiĉe multnombraj por fermi sian pardonon al siaj transkurtenaj fratoj. Ili dirus, ke ili ne povas ignori la pli ol dek kvar mil organizitaj orienteŭropaj esperantistoj.

Antaŭ ol fini ĉi raporton pri reagoj, mi devas noti, ke ĝis hodiaŭ tute silentis la nacia Esperanto-Asocio al kiu mi aliĝas, UFE, Franca Unio por Esperanto.

Sendube ĝia prezidanto, samideano Hervé Gonin, timas sin kompromiti.

Nune venis tempo konkludi, kaj mi esperas, ke miaj paroloj neniun incitos.

Mi unue konstatu, ke NEM estas sekta movado, kaj due, ke la nuna skismo ege malutilas Esperanton.

Mi opinias, ke memama vundo ne povas esti sufiĉa motivo por dezerti UEA-on.

D-ro Lapenna, kiu estas la Unua Esperantisto el la nuntempo, devus reanĝi UEA-on, kiu estas la unuaranga esperanto-organizaĵo de la nuntempo. Ne eblas ja forlasi asocion, inter kies arkitektoj oni fakte estis unu el la plej kompetentaj, tiel permesante al nove venintoj ĝin saboti kaj finfine eble detrui.

La puĉistoj neniom pezas kontraŭ Lapenna. La batalfronto situas ne ekster UEA, sed en la sino de UEA.

Por ke daŭre vivu en UEA homaranismo, humaneca internaciismo, interna ideo, unuvorte esperantismo, Lapenna kaj liaj amikoj devas retrovi la vojon al UEA.

Tio ne implicas likvidon de NEM, sed ĝi, male, miaopinie, konsistigas la nepre necesan kondiĉon por ke la Neŭtrala Esperanto-Movado povu, laŭ mensa vidpunkto tute libere, kaj laŭ organiza vidpunkto plene sukcese evolui, plinombriĝi, plivastiĝi, unuvorte plipopulariĝi.

Pri ĉio tio mi certas, kaj ĝojus se eĉ nur kelkuj el vi partoprenus ĉi certecon.

Tial mi aŭdacas fini mian paroladon emfazante:

Vivu NEM!!

Vivu UEA!!

En Jaca 25/8/78

Rimarko de Prof. I. Lapenna. — Alte aprezante la pensojn de D-ro Salan, mi nur deziras atentigi la legantojn, ke mi ekŝiĝis el Honora Membreco kaj el ĉiuj funkcioj en U.E.A. dum la U.K. en Hamburgo meze de 1974. Tamen mi restis ordinara membro. Mi ekŝiĝis ankaŭ el membreco nur fine de 1975, do post unu jaro kaj duono, kiam mi konstatas, ke la posthamburga gvidantaro de U.E.A. malpermesis la publikigon de mia konciza ekspliko al la membraro pri la kaŭzoj de mia ekŝiĝo el HM kaj diversaj funkcioj en Hamburgo, kiel ankaŭ de pluraj korektoj senditaj al la redakcio de «Esperanto». La saman sorton ĝisvivis ankaŭ aliaj elstaraj estintaj funkciuloj de U.E.A., tute egale ĉu ili restis membroj aŭ ne. Resti membro de organizaĵo, kies strikta cenzuro sufokas la veron, estis por mi maleble. Cetere, mi fidis, ke ekster U.E.A. mi faris pli por reestabli la veron kaj por malebligi eĉ pli grandajn erarojn de la posthamburgaj gvidantaroj, ol se mi estus restinta membro. Kaj tio, fakte, estas en la intereso de U.E.A. kiel imagita de Hodler kaj de ĉiuj aktivuloj en la Asocio, inkluzive min mem, ĝis Hamburgo. I. L.

FOR! LA MITOJ KAJ LEGENDOJ

PRI LANDNOMOJ

Jam de 80 jaroj brulas mitaj flamoj pri landnomoj en Esperanto! La supozo, ke la lastaj braĝoj forfumis montriĝas ne vera; de temp' al tempo flagras kelkaj pluaj feaj fajroj: laste «Horizonto» aperigis artikolon ja inteligentan sed ja mitabundan kaj legendoplenan. Jam temp' estas definitive cindrigi tiajn aperaĵojn. Feliĉe, la eldonejo STAFETO decidigis eldoni la verkon «Vojaĝo tra la landoj», en kiu mi donas al ĉiuj legantoj simplajn klarigojn pri l' afero samtempe kun 90 jaroj da historia superrigardo.

—oOo—

Ci tie mi limigos min per asertoj. Bonvole turnu vin al la libro, kiu devus aperi en 1980. Oni devas scii kelkajn punktojn jenajn:

1. Estas nur unu vera kaj aŭtenta «sistemo de Zamenhof» pri landnomoj. Trovebla en la unuaj broŝuroj kaj uzata nur antaŭ 1900, ĝi konsistas en tio, ke ĈIUJ landano-nomoj estas radikaj; de ili oni derivas ĈIUJN landnomojn per sufikso, kaj tiu sufikso estas -ujo. Ekzemple: Amerikoj, Alĝeroj, Portugaloj, Holandoj kaj Japanoj loĝas en Amerikujo, Alĝerujo, Portugalujo, Holandujo kaj Japanujo. Eminente klara kaj logika tiu sistemo plaĉas al ĉiuj niaj modernaj nepentantaj «skemistoj» kaj kun ili ni povus plu ĝoji kaj gaji per «Oceanoj vivas en Oceanujo kaj Teroj sur Terujo». Tamen fakto estas, sobra kaj nerefutebla: tiu sistemo malaperis antaŭ 1900.

2. Eldonanto de l' «Adresaro de Esperantistoj», kiu aperis en multaj sinsekvaj kaje-retoj, Zamenhof konstante kaj dum jaroj registris adresojn el la tuta mondo. Li, tiel, iom post iom, praktike konatiĝis kun la monda internacieco de landnomoj; nomenklatura punkto relative negrava, tiam, por naskiĝanta lingvo. Li do enkondukis «Ameriko, Eŭropo... — Ho! Skandalo, krius Volapukistoj, kutimiĝintaj al Merop, Yurop kaj aliaj kontinentoj kun sufikso -rop, kaj duobla ho! li aŭdacis eknomi «Alĝerio», la landon de urbo Alĝero, forgesante la ekziston de pronomo «io»! La primitiva sistemo estis do rompita kaj ni jam estis survoje al sistemo obeanta la 15-an regulon de l' Fundamento kaj vere konforma al internacieco en mondaj kadroj.

3. Bedaŭrinde, venis markizo de Chevreux, la logikisto kaj estonta korifeo idista kun siaj rigidaj — malvivaj — principoj. Pardonu! Mi volis diri Beaufront, nek markiza, nek belfrunta! Li, sed neniel Zamenhof, estis la patro de l' etnografia principo, laŭ kiu, *sendepende de l' internacia signifo kaj de l' etimologio*, radiko nepre montru genton, se «la nocio de gento superas tiun de lando». Laŭ tio, ĉar la lando Portugalujo havas apartan genton kun aparta historio kaj aparta lingvo, la malfeliĉa radiko Portugal- kontraŭ la etimologio (Portus Cale = Haveno Kale) kaj la pli granda, la monda internacieco, nepre devis signifi genton! Ja la rusa diras Portugalia = la lando de Portus Cale, sed ne forgesu ke ĝi ankaŭ diras Portugalec = ano de Portugal; alidire ni ĉi tie konatiĝas kun la nocio de neŭtrala radiko: de l' rusa radiko Portugal oni derivas kaj la nomon de lando kaj la nomon de landano. Alian kazon? Konsideru la du ideogramojn, kiujn oni nun skribas latinlitere, en la sistemo «Pin Yin», jene: Ri Ben kaj do prononcas ĵiben en la «Centra lando» — dum oni oficiale transskribas kaj prononcas ilin Nippon en la lando de la «Leviĝanta Suno». Nu! oni trudis al la responda pli-malpli internacia formo «japan» la signifon de landano, nome la signifon de «nippon-zin» en la japana kaj de «Ri Ben Ren» (legu ĵibenjen) en la ĉina! Kun la rezulto ke «Japanujo» aŭ ĝia ĝemelo «Japanio» estas vorto ekzistanta nur en Esperanto, spite al la originaj lingvoj kaj al la monda internacieco. Envere la etnografia principo estas neeltenebla! Cetere jam Beaufront sentis tion, kiam li dekomence kreis escepton por Holando, Irlando k.a. Kaj kiam la persa registaro decidis trudi al la mondo la aŭtentan nomon Irano, ĉiuj lingvoj — inkluzive Esperanton — adoptis ĝin! Tiam, Ho, strange, neniu protestis, ke al «persoj, Persujo», devus respondi «iranoj, Iranujo». Alia kazo: Niĝero: rivero KAJ lando; Niĝerio: alia lando.

4. Feliĉe, nek la aŭtenta sistemo de Zamenhof, kiu havis la meriton esti plene logika, nek la etnografia principo, kiu kondukis nin al nomenklaturado propra nur al Esperanto, sed nek logika, nek regula, feliĉe neniu el ambaŭ apartenas al la Fundamento. Kontraŭe, Fundamenta estas la principo de internacieco, laŭ kiu internacia vorto per si mem rajtas eniri la lingvon: temas pri la fama 15-a regulo. Konsekvence, ĉar la landnomoj estas monde internaciaj, la heroldoj klarionantaj kontraŭ la troa okcidenteco de Esperanto, devus subteni la uzadon de l' aŭtentaj nomoj de la landoj: ĉiufoje, kiam ili ekuzas pli monde internacian landnomon, ili samtempe kaj aŭtomate proksimigas Esperanton ankaŭ al la *neokcidentaj lingvoj!*

Tion cetere demonstros la pli ol 30-lingva «Glosaro de landnomoj kaj landano-nomoj, dua parto de l' «Vojaĝo tra la landoj». Ĝi donas interalie la nomojn uzatajn de l' 13 plej parolataj lingvoj en la mondo, inter kiuj troviĝas, kiel ĉiuj scias, la ĉina, japana, araba kaj indonezia lingvoj; kaj tiuj 13 plej parolataj lingvoj reprezentas pli ol la duonon de l' Ter-loĝantaro.

5. Ekster siaj reform-projektoj, kie Zamenhof nete — ĉar libere — difinas la sufikson —i— por landnomoj, apud —ier— por arbonomoj, la «Iniciatoro» de Esperanto plurfoje proponis aŭ uzis la sufikson —i—; oni vidu: la Adresarojn, la traktatojn pri Hilelismo kaj Homaranismo, kaj la fame konatan «Lingvan Respondon».

Ankaŭ ekster landnomoj Zamenhof frue uzis la sufikson: «veterinario» en la Adresaroj, la fama atentigo «diplomatiisto = diplomato» en la Fundamento mem. Konata jam de l' Helenoj kaj Latinoj, ĝi troviĝas ankaŭ en la lituana lingvo, tre proksima parenco de l' Sanskrito kaj aliaj hindaj lingvoj. Tradicie, do, kaj nun en multegaj lingvoj la sufikso —i— estas uzata nur parte por nomi landojn, sed ankaŭ por nomi diversajn kampojn de agado, de studo, de reserĉado. Eblus ĝin difini kiel «sufikso, kiu *nomas* specifan teritorion, aŭ konkretan (t.e. landon, regionon, ktp), aŭ abstraktan (arto, tekniko, scienco...), ekz-e: veterinario, inĝenierio, diplomatio, filozofio, biologio...».

Mi insistas pri la vorto «*nomas*»; efektive, la sufikso ne donos al vi la priskribon, kaj ankoraŭ malpli la plenan absolutan scion pri unu aŭ la alia el tiuj «teritorioj»; ĝi nur *nomas* ilin. Necesos ilin aparte difini, aparte studi, ili estu landoj, artoj, teknikoj aŭ sciencoj, aŭ ankaŭ sanstatoj aŭ malsanstatoj... Mi insistas la vorto «*nomas*» ĉar efektive la sufikso —i— estas mem *nomo*, almenaŭ elemento de *nomo*. Pro tio, same kiel neniu rajtas transbapti ekzemple sciencojn, kiuj jam nomiĝis biologio, spektrografio, geologio... tiel same neniu rajtas *nomi* alimaniere landojn, kiuj per siaj aŭtentaj kaj oficialaj organoj decidis nomiĝi ekzemple Zairo, Ĉado, Nepalo... aŭ kiuj tutmonde estas konataj per nomoj, kiujn donis al ili en diversaj historiaj kondiĉoj aliaj popoloj, aliaj nacioj, kiel ekzemple Koreo, Vietnamo... En Aprilo 1964 la ŝtato Tanganjiko (apud la samnoma lago) unuiĝis al la ŝtato Zanzibaro (formita de insuloj Zanzibaro kaj Pembo kaj kun ĉefurbo Zanzibaro) kaj tiel naskiĝis la «Unia Respubliko Tanganjiko kaj Zanzibaro»; en Oktobro samjara la nova ŝtato donis al si la nomon Tanzanio: —i— estas samvalora nomelemento kiel Tan kaj Zan! En Aprilo ĉi-jara Rodezio alprenis la nomon Zimbabveo, sen sufikso —i— aŭ —uj—. Ni ne rajtas ŝanĝi tiun nomon per sufikso aŭ alia. Mi koncedas nur ke restas la problemo de l' ortografio; sed tio estas alia problemo, nur ĝi koncernas ĉiun lingvon aparte.

6. La sufikson -io oni komencis plene kaj sisteme uzadi jam en 1900, sed fortan impulson donis Hodler, la fondinto de UEA kaj redaktoro de l' revuo «Esperanto». Ĉirkaŭ 1920 pli ol la duono de l' periodaĵoj — kaj la plej bonaj — plene akceptis la novan nomenklaturon. Cart, per tordo de l' tekstosignifoj kaj aliaj manovroj, talpe, obstine kaj persiste sieĝis kaj sapeis la venkabundanon uzadon. Pro li, sekvis senfina batalo inter la partianoj de -ujo kaj tiuj de -io. La nuna Akademio, saĝe rekoninte la vivokapablon de -io, kiu restis vigla dum 70 jaroj malgraŭ ĉiaj atakoj, kalamnjoj kaj ekskomunikoj, nur donis al la Vivo la permeson sin libere esprimi. Milde dirite, la duono de Esperantistoj uzas la sufikson -io; ja tiu «duono», same kiel la alia, nun havas sian kutimon bone establitan. Estas do *tre dube*, ĉu «*tiu duono*» de l' — ni diru — 8 milionoj da Esperantistoj, iam rezignos pri formoj identaj al tiuj jam konataj de almenaŭ la duono, kaj pli ol verŝajne la granda plimulto, de l' 4 miliardoj da Teranoj.

7. La aserto, ke sufikso -io donas aspekton sennaciecan al la lingvo estas unu el la plej grandaj mistifikoj; la inventinto de tiu mistifiko estas la sama ruzulo Prof. Cart. La «Vojaĝo tra la landoj» donos plenajn klarigojn ankaŭ pri tio. Cetere, tia aserto pri sennacieco estas bumeranga stultaĵo: ĉiuj naciaj lingvoj posedas la internaciajn landnomojn, do kune kun ili ankaŭ la sufikson -io, do ili verŝajne estas multe pli sennaciecaj ol Esperanto, kiu ja posedas ĝin en la praktiko, sed ankoraŭ ne oficiale! La vero, estas, ke la sufikso -ujo povas utili por kristaligi ŝovinisman de nova speco: la esperantisma!

Jen do kelkaj asertoj, kiuj provizore utilu por kontraŭbatali falsajojn kaj malveraĵojn tro neserioze kolportitajn de Esperanta generacio al alia.

—oOo—

Malpravo de multaj estas forgesi la moton de Zamenhof sur la Unua Libro; moto fakte direktita kontraŭ Volapuko: «Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas ĝin nomi tia». Efektive kelkaj opinias, ke por esti universala Esperanto devus elekti pure inventitajn vortojn: ili estus universale egalaj por ĉiuj! Car og. estas prenita el neniu lingvo, ĝin komprenos ĉiu! Kaj ĉiu scios ĉion pri tiu ogaĵo, nenion lerninte pri ĝi kaj nur per la magio de l' vorto mem!

Kaj mi aldonos, kun malica okulumo al miaj legantoj: «Fine! veterinario ja estas la Io specifa por ĉiuj veterinarioj, same kiel Francio estas la Io specifa por ĉiuj Francoj; en ambaŭ okazoj la specifa Io eĉ plene difinas la koncernitojn». Ha! Tamen!

D-ro. A. ALBAULT

Postnoto. Jus aperis samtema artikolo de Bernard Colden (Horizonto n.º 22, Jul.-Aŭg. 79). Interesaj sugestoj en ĝi estas 1.º Uzadi la sufikson —ik—, ekz-e: apud Belgio (latine Belgium) oni povus uzadi Belgiko (latine: Belgica Gallia, aŭ simple Belgica). Tute komprenebla solvo, kiam la latina aŭ alia lingvo uzas la precedon! Sed oni gardu sin krei neekzistantajn proprajn nomojn kaj do konfuzon. 2.º Uzi en difinita teksto, kiam necesas eviti konfuzon, precizigajn adjektivojn kiel nova aŭ olda. Mi tute aprobas kaj volonte aldonas: nuna kaj prefikson pra-

Tamen mi absolute ne povas sekvi la aŭtoron, kiam li proponas krei specife esperantajn nomojn. Landnomoj kaj landano-nomoj estas propraj nomoj.

Ni ne rajtas transbapti! Distingo inter etnonomoj kaj ordinaraĵ landanonomoj estas preter la atingopovo de vorttrezoro: oni lernu historion kaj etnografion.

KELKAJ ASPEKTOJ PRI LINGVOPROBLEMOJ EN LA MULTNACIAJ GRUPIĜOJ

Tia estas la titolo de artikolo verkita de Hubert Joly, konsilisto pri Fremdaj Aferoj, estiel Generala Sekretario de la Internacia Konsilio pri la Franca Lingvo; kiu artikolo aperis en la revuo duonjara de la Konsilio sub la titolo: «*LA BANKO DE LA VORTOJ*», ĉar ĝi prezentas ĉefe studaĵojn kaj rekomendojn pri la formiĝo de novaj vortoj en la franca lingvo.

—oOo—

Interesa por ni geesperantistoj estas precipe la provo klasi la lingvojn laŭ sociaj grupiĝoj.

«*Ce unua proksimumado oni povus konsideri ses grandajn tipojn de grupiĝoj al kiuj respondas funkcioj de malsamaj lingvoj laŭ la ĉi-suba tabelo.*

<i>Regiona lingvaĵo</i>	<i>Loka komunumo</i>
<i>Dialekto</i>	<i>Regiona Komunajo</i>
<i>Regiona Lingvo</i>	<i>Etnio</i>
<i>Nacia aŭ Oficiala Lingvo</i>	<i>Nacio</i>
<i>Internacia Lingvo</i>	<i>Stato aŭ grupoj de ŝtatoj.</i> »

Tiel «*regiona lingvaĵo*» estas «*la tuto de la vortaj, fonetikaj kaj sintaksaj varioj de lingvo parolata en loka komunumo, sen ke ĉi tiu konscias pri la varieco rilate al la lingvo parolata en pli vasta geografia unuo, ekzemple: varvoule (Dauphiné)*». Tia lingvaĵo, kiu esence nomas «*pure lokajn konceptojn (objektojn kaj procedojn)*... ne povas kontribui en la ellaborado de politika konscio».

Male «*dialekto*» estas «*la tuto de la vortaj, fonetikaj kaj sintaksaj varioj de lingvo parolata en regiona komunajo*», kiu konscias pri la varieco. Kiel tia, ĝi ebligas la esprimadon de originalaj kulturaj konceptoj, kaj sekve la manifestiĝon de regiona personeco, eĉ se ĝi plej ofte restas nur folkloro.

«*Regiona lingvo*» estas esprimo de «*komunajoj lingve aŭtonomaj rilate al la najbaraj*», aŭtonomeco ofte kun kultura kaj administracia aŭtonomio, eĉ foje politika. Tia lingvo povas ŝanĝi kategorion laŭ la vidpunkto: la alsaca, «*regiona lingvo en Francio, estas rigardata nur dialekto en Germanio*».

La nocio de nacia lingvo estas multe pli delikata, ĉar ĝi ne nepre respondas al ŝtato: ekzemple, «*la flandra estas regiona en Francio, oficiala en Belgio kaj iĝas nacia en Nederlando*». Aliflanke sama lingvo povas esti oficiala en pluraj ŝtatoj.

«*Oni surprizos nenium, eldirante, ke iu nombro da lingvoj plenumas la funkcion certigi komunikadon inter malsamaj nacioj aŭ ŝtatoj: tia estas la kazo de la germana, franca, angla, araba, hispana, portugala se citi nur la plej vastigitajn.*

Konvenas ĉi tie citi kompletocele internacian lingvon, kiu estas nacia aŭ oficiala en nenia lando: esperanton.

Alia kazo tre grava estas tiu de naciaj linvoj, kiuj, kvankam ne internaciaj lingvoj, atingas en institucio aŭ organizo internacian statuson: tia estas la kazo de la itala en Eŭropaj Komunajoj, tiu de la ĉina en Unuiĝintaj Nacioj. Ilia unika funkcio estas tiam ebligi al la nacio, ĝin parolanta, ke ĝi esprimu sin per sia gepatra lingvo en internacia institucio. Ĉi tiu internacia statuso cetere estas pli malpli firma laŭ tio, ĉu la lingvo estas rigardata nur lingvo de samtempa interpretado aŭ ankaŭ plenrajta laborlingvo, kun ĉiuj instituciaj dokumentoj verkitaĵoj aŭ tradukitaĵoj en tiu idiomo.»

—oOo—

Tiel la cito de esperanto en la klaso de internaciaj lingvoj eĉ nur kompletocele estas ja kontentiga konstato; sed ĉia ekzaltiĝo pro tio ne taŭgus, ĉar baldaŭ poste venas verdikto de antaŭjuĝoj.

«*Neniu el la ĝis nun atentitaj solvoj aspektis sufiĉe kontentiga por ke oni intencu ĝin adopti...*

La unua konceptebla solvo estus la alprenado de artefarita lingvo nova propra al la nova geo-politika aro.

Tiu formulo de tipo «*esperantista*» havas por si la avantaĝon esti perfekte neŭtrala el politika vidpunkto. Se ĝi lokas ĉiujn ŝtatojn kaj ĉiujn lingvojn sur la sama nivelo, ĝi havas la malavantaĝon devigi ĉiujn ŝtatoficistojn kaj diplomatojn asimili unu tekno-lingvon sen literaturo kaj kulturo, kaj kies disvastiĝo en la popoloj ekster la institucioj kaj strukturoj povus fariĝi nur tre malfacile. Tiu hipotezo, kiel montras cetere la relativa malsukceso de esperanto, estas precipe unu lim-hipotezo, kies ĉefa merito estas marki la limŝtonojn de la verŝajneco.»

Tiel do, tuj oni citas esperanton por plej bone enterigi ĝin! Oni rekonas, ke ĝi estus perfekta solvo el politika vidpunkto; sed oni antaŭvidas nur novan nebulan projekton, kiu kompreneble estus nur teknika ilo «sen literaturo kaj kulturo», kaj ĝuste tial oni des pli facile kondamnas kaj forpelas ĝin. Sed oni vole ignoras esperanton mem, kiu havas literaturon kaj portas kulturon. Sekve, tio montras al ni, geesperantistoj, la vojon sekvotan en estonta informado. Du gravaj punktoj devas esti multe pli ekspluatitaj ol ĝis nun: subteni kaj elmontri per nacilingvaj tradukoj (se bezone) ne la tradukan sed la originalan literaturon; manifesti kaj studi per eseoj la karakterizajn ecojn de la kulturo en esperanto. Unuvorte emfazi la beletran kaj kulturan aspektojn prezentitajn de la lingvo: ni fieru pri ili multe pli ol ni kutimas ĝis nun!

—oOO—

Ĉar ĉiukaze oni efektive ankoraŭ ne trovis pli bonan solvon ol esperanton.

«La dua hipotezo, diras Hubert Joly, estas tiu de superreganta lingvo, kiu estus laŭstatute altrudita aŭ iom post iom altrudiĝus al la tuto de la ŝtatoj.

Ce la nuna stato de la aferoj tia situacio, kiu en la Eŭropo de la Naŭ povus aplikigi al la angla, al la franca aŭ al la germana politike ŝajnas malfacile konceptebla. Oni ne vidas kontraŭ kio escepta statuso povus esti negocita profite al unu el tiuj lingvoj.

La tria hipotezo, la aktuala, certigas la statusan egalecon de la lingvoj. Dume ilia teoria nombro sep povis esti reduktita je ses laŭ tio, ĉar Irlando akceptis ne postuli la uzadon de la gaela. Estas evidente, ke la disvastiĝo de la Eŭropaj Komunaĵoj igos pli malfacila kaj multekosta la solvon de tiu demando. Kelkaj proponis, ke la nombro de la oficialaj lingvoj de la Komunaĵoj estu reduktitaj je kvar sed oni komprenas, ke la rezignado de unu lando esprimiĝi en sia lingvo en institucio pli forte kunlaboreca kaj struktureca ol estas la institucioj de la Unuiĝintaj Nacioj estas grava ero de prizorgeco.

Oni do ne vidas kiel prove trovi en la eŭropaj institucioj formulon, kiu plene respektas ĉies interesojn kaj estas aplikebla ekonomie.

Pro manko trovi ĝin — kaj necesas ja konfesi, ke tio ne estas facila — eble oni povus imagi profite al la landoj, kiuj iel akceptus vidi sian lingvon konkurita de aliaj en la «komuna merkato de la lingvoj kaj de la kulturo» (tiel!) la atribuaĵon de «kompensaj kulturaj monsumoj», kiel esprimon de solidareco, kiu ja valorus tiun de la agrikultura merkato. (Tiel!) Oni volas esperi, ke la monaj malfeliĉoj malpli influus sur la kulturon ol sur la agrikulturon! (Tiel!)

Se tia sugesto, kies spekulativan karakteron mi rekonas tuta, ne povus alceli, necesus pripensi novajn formulojn.»

Kaj la aŭtoro proponas la jenon:

«Eble estus pli prudente postuli, krom la uzado de la gepatra lingvo, la aktivan scipovon de lingvo kun granda disvastiĝeco kaj la pasivan konon de alia eŭropa lingvo, kio estas alia formulado de la sama problemo kaj povas atingi al pli granda malfermo de la elektoj. La politika kaj kultura sento ne estus vundita. Male estus plifortigita la sento de aktiva solidareco inter la anoj de landoj membroj de la Komunaĵoj.»

—oOO—

Konklude tiu artikolo montras unu plian fojon la aktualecon de la demando pri internacia lingvo, la nemalhaveblajn ecojn de esperanto por tiu funkcio, kaj la gravan respondecon de homoj kiel Humphrey Tonkin, kiu en la plej trafa momento senigis UEA-n je la necesa unueco por sukcesigi la venkon de esperanto, je la profito de iu politika kliko!

Jean Thierry

NI KONDOLENCAS

Cifoje la dolorigaj mesaĝoj venas de Italujo kaj Svedujo: Niaj sindonaj samideanoj kaj amikoj

Prof. Mario Bardini, el Mantova
Vittorio Dall' Acqua, el Milano
Peter Diksztejn, el Huddinge

mortis!

Ili pace ripozu! Ke ilia laboro kaj sindediĉo estu fekunda grundo por novaj generacioj.

Por iliaj familioj nian plej sinceran kondolencon.

OMAGĜE

AL SES JUNAJ KATALUNLINGVAJ MORTINTAJ POETOJ

(Francesc Casas i Amigó, Joaquim Folguera, Joan Salvat-Papasseit, Bartomeu Rosselló-Pòrcel, Màrius Torres kaj Cèsar Nogués)

Pro junaj kaj altkreskaj fago aŭ abio
eltrafitaj de fulmo,
reeŝe plendas la arbara monto.

Pro tiu orkolora tritikkampoj
malbonŝance misdraŝita de la hajlo,
la klingoj, kiuj ĝin estus prifalĉintaj,
ruste malakriĝadas
pendante en la muro.

Pro birdido
(ŝajne libera dum ekprovflugado)
forrabita de la nizo,
glisanta lum' ŝrike konvulsiĝas.

Pro infaneto ĵus mortinta
— aj, nur momenta iluzi' en blanka ĉerko! —
akuŝdoloro senmezura
skuas la patrinojn de la tuta mondo.

* * *

Kaj pro juna poeto ĵus mortinta,
la kor' de la Patrujo lia
ŝirige kaj senfine ploras!

Gabriel MORA i ARANA

LE TEMPS D'UN PEU

Que voulez-vous que je fasse du monde
Puisque si tôt il m'en faudra partir.
Le temps d'un peu saluer à la ronde,
De regarder ce qui reste à finir,
Le temps de voir entrer une ou deux femmes
Et leur jeunesse où nous ne serons pas
Et c'est déjà l'affaire de nos âmes.
Le corps sera mort de son embarras.

Jules Supervielle
(Les amis inconnus)

LA TEMP' APENAU

Cu frandu ni la donacitan mondon,
Se tiom baldaŭ jen adiaŭgest'?
La temp' apenaŭ danki l'spektorondon,
Primiri l'denson de l' farenda rest';
La tempo gapi paron da juninoj,
Pro l'aĝo, ve! nin detenantaj for;
Sonoros jam la horo de l'animoj:
Naskiĝos mort' el tro balasta korp'.

Trad. J. L. Tortel

Fatalo?

— Alarm'! — ekvibris akraŝire.

Subite li levigis el la ŝtupo kuŝanta sur la korto kaj metante rapide en la poŝon la preglibreton, el kiu li ankoraŭ antaŭ kelkaj sekundoj preĝis, kiel fulmo ensaltis en la vilaĝan kabanon. Tie, li kaptis sian karabenon staranta kun aliaj armiloj en la angulo de duonkrepuska ĉambro, kaj per alia mano ekkaptinte rimenon de la tornistro, li surĵetis ĝin trans la brakon surdorsen. Li kaptis la mantelon kaj la zonon kun fiksitaj al ĝi kartoĉuoj, bajoneto, ŝpateto kaj ladbotelo ingita en feltan tegilon. Ŝarĝita de tiu ĉi balasto, li elsaltis el la kabano kaj ek! — kuregis en la korton.

Tie, apoginte la karabenon al la ĝardena barileto, li komencis nerve vestiĝi. Kiam li estis pli malpli preta, li prenis sian fuzilon kaj volis fermi ĝin ŝarĝseruron. Vane, tio ne sukcesis al li. Ankoraŭ kelkfoje li provis enpuŝi ĝin perforte en la kulasĉelon, sed la kulaso neniamaniere volis fermiĝi. Tiam la soldato eltiris la malican seruron el la ĉelo kaj murmurante ion nekompreneblan, fine, duonrezignita diris:

— Certe iu el la kamaradoj, ŝerce, enpakis ion en la truon! — Sed en la truo estis nenio. La kulaso estis en plena ordo, kaj malgraŭ ĉio, fermi ĝin oni ne povis. La malfeliĉa soldato provis ankoraŭ foje rigli ĝin perforte, frapante la kulastenilon kontraŭ la barilfoston. Sed ankaŭ tio ne helpis.

Fine, li kaptis la malobeeman karabenon kaj timigita, per tremanta voĉo balbutis:

— Certe iu malfeliĉo! Mi sentas tion. La seruro ne volas fermiĝi. Sen iu ajn kaŭzo... Mi scias... Trafos min iu malfeliĉo... Dio..., ho, Dio...! mia Dio...!

Ekscitita ekstreme, kun la kulaso en la mano, li surĵetis la armilon surdorsen, kaj turninte la kapon al proksime staranta kaj mute observanta lin knabo, ekĝemis:

— Dio, savu min...! Kaj sin krucsigninte rapide — Ĝis revido — diris malgaje... kaj ekkuris.

Dumvoje, li plu ripetadis ekscitita:

— Kaj tamen... Ĉi aĉa seruro... Ĝi montras... Mian malfeliĉon... Mi sentas tion... Kaj eble mi fermos ĝin tie, sur la raportplaco...?

Baldaŭ li malaperis malantaŭ la duondetruita garbejo, kurante al la placo.

Kiam post du horoj revenis el la rezista ĉefpozicio la anstataŭigita kompanio, la soldatoj kunportis la mortigitan kolegon, kiun ili trovis en la tranĉeo. Li havis dissplitigitan kapon per obusa rompaĵo, kaj en la poŝo de la mantelo... la kulason.

Oni diris, ke en tiu tago estis nur unu, unusola ŝrapnelo, kiu eksplodis sur la ĉielo super la tranĉeo.

La kamaradoj enterigis lin provizore. Sur kampo. En sulko. Proksime al la vojeto. Kaj la tombon signis provizora, mallerte farita el du betulaj branĉoj kruco. Sur ĝi — la ĉapo kaj botelo kun la regimentnumero kaj la nomo de la viktimo de la milito.

La fatalo kreita de la homo plenumiĝis.

La knabo sin krucsignis.

Estis la jaro 1915.

Postvorto unua: Jes, la sorto estis tiom pli kruela, ke ĝi trafis soldaton poldevenan, polon, perforte mobilizitan fare de germanoj en sian armeon el la okupaciita teritorio de iama Pola Reĝlando, kaj la obuso estis pafita — kiel oni poste diris — de artileria baterio, priservata fare de poloj, perforte mobilizitaj al la rusa armeo el alia parto de Polujo, okupaciita de Ruslando.

Frato mortigadis la fraton, patro — la filon, la filo — la patron!

Postvorto dua: Dum pli ol kvindek jaroj, sur tiu provizora tombo — kiu tamen fariĝis daŭre neŝanĝita — kreskis la sovaĝa pirarbo. Soleca, ĝi susure ludis funebran kanton pri la soleco de la homo, arbo, vivo. Kun ĝemo de agonianta homestaĵo, ĝi falis sub la hakilo de la homo.

Postvorto la lasta: Sur la forgesita tombo de la homo, sur la tombo de la sovaĝa pirujo situas nun vasta, lerneja placo, sur kiu svarme kaj gaje pilkludas la infanoj...

La tomboj piedpremataj per la ĝojo de l'vivo!

Fatalo?

La vivo fluas plu!

Granda Leĝo de l'Ento?

Magia cirklo de l'Eterno!

Profunde mi enpensigis...

.....

Kredo, Espero, Homamo...

Estas la jaro 1977!

Jan Smykalski

REZOLUCIO
DE LA
KVINA INTERNACIA KONFERENCIO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

(Ateno, 8.-15.9.1979)

La Kvina Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, okazinta en Ateno de la 8-a ĝis la 15-a de septembro 1979, post detala pritrakto de la Enkonduka Raporto de prof. d-ro Ivo Lapenna pri la Perspektivoj de la Internacia Lingvo (Esperanto) en la Nuntempa Mondo kaj pri la Situacio en la Esperanto-Movado, unuanime decidis formuli la ĉefajn principajn konkludojn en la sekvantaj punktoj:

- 1) *Akriĝo de la problemo.* — La rapide komplikiganta lingvoproblemo en la internaciaj rilatoj preme kaj urĝe postulas radikalan solvon. En tiaj kondiĉoj la eblecoj ĝeneraligi la uzon de Esperanto kiel neŭtrale homa instrumento de lingva komunikado en interpolaj rilatoj konsiderinde kreskis. En la daŭro de 1-2 generacioj la celo povus esti atingita, se la Esperanto-Movado laborus unuece, surbaze de realecaj ĉiudirektaj agadprogramoj, kiel tio okazadis ĝis la Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo (1974), kaj kiel tion pruvas la nekonstateblaj ĉiuf flankaj progresoj ĝis tiu jaro.
- 2) *Negativaj sekvoj de Hamburgo.* — Bedaŭrinde, la konataj hamburgaj eventoj, grandparte kaj esence inspiritaj de ekstermovadaj politikaj fortoj, kiel pruvite en la verko *Hamburgo en Retrospektivo* kaj en la periodaĵo *Horizonto*, kaŭzis ke la gvidantaro de la iam politike neŭtrala kaj sendependa U.E.A. venis sub fortan influon kaj daŭre kreskantan premon de partipolitikaj Esperanto-organizaĵoj aŭ instancoj, agantaj en U.E.A. laŭ la ĝeneralaj direktivoj aŭ rektaj instrukcioj de *partipolitikaj faktoroj ekster la Esperanto-Movado*. Tio perdis al U.E.A. la neŭtralecon, kiel difinitan en la Statuto de la Asocio, kaj la sendependecon, do la du esencajn antaŭkondiĉojn por efika agado en ĉiuj sociaj medioj, kaj kaŭzis gravan, eble ne plu ripareblan, politikan kompromitiĝon. Tio, siavice, interne malfortigis la Asocion. Interalie, post Hamburgo ĝin forlasis pli ol unu kvinono de la individuaj membroj, inter kiuj multaj tre valoraj aktivuloj. Ne estas surprize, ke ekde 1974 U.E.A. ne nur ne progresis, eĉ ne stagnis, sed grave malprogresis sur ĉiuj linioj, kiel klare vidiĝas el la Estraraj Raportoj. La posthamburgaj gvidantaroj ne povis prezenti unusolan objekte valoran novan atingon malgraŭ la unike favoraj eksteraj cirkonstancoj.
- 3) *Profunda krizo.* — La politika kompromitiĝo de U.E.A. pro la evidente partipolitikaj programoj kaj agadoj de granda parto de ĝiaj «landaj asocioj» (fakte partipolitikaj organizaĵoj aŭ instancoj), kaj sekve de iliaj komitatoj en UEA, kaj pro la kompleta pasiveco de la alia parto rilate tiujn partipolitikajn aktivadojn, necesigis la esprimiĝon de la tradicia partipolitike kaj religie neŭtrala zamenhafa Esperantismo, inspirita de humaneca internaciismo, pere de la Neŭtrala Esperanto-Movado (N.E.M.) kaj de ĝiaj agadgrupoj. Ne estas, do, N.E.M., kiu kaŭzis la nunan profundan krizon, sed, male, la profunda krizo kaŭzita de la hamburgaj eventoj necesigis la formiĝon de N.E.M. kiel *idea daŭriĝo de la antaŭhamburga U.E.A.*
- 4) *Kion celas N.E.M.?* — N.E.M. ne estas organizaĵo. Ĝi ne havas membrojn. Ĝi konsistas el ĉiuj Esperanto-parolantoj, kiuj — ĉu en U.E.A. mem, ĉu ekster ĝi — apogas la principon de strikta religia kaj partipolitika neŭtraleco, kiel difinita en la Statuto de U.E.A. kaj kiel observata ĝis la Universala Kongreso en Hamburgo, kaj kiuj agas konforme. La plej grava laŭtparolilo de N.E.M. estas la elstara periodaĵo *Horizonto*, kaj la ĉefaj publikaj manifestiĝoj de N.E.M. estas ĝiaj Internaciaj Konferencoj. La publikaĵoj, konferencoj kaj aliaj agadoj de N.E.M., ĉiuj direktitaj al plua disvastigo de Esperanto kaj inspiritaj de humaneca internaciismo, jam plenumis pozitivan rolon kaj interne de la Esperanto-Movado kaj en la ekstera mondo: N.E.M. sukcesis malhelpi aŭ almenaŭ iom malrapidigi eĉ pli fatalajn erarojn de la posthamburgaj gvidantaroj de U.E.A., unuflanke, kaj montris al la ekstera mondo, ke la partipolitike neŭtrala Esperanto-Movado ankoraŭ ekzistas kaj malakceptas la politikigon de U.E.A., aliflanke.
- 5) *N.E.M. kaj U.E.A.* — Kontraŭe al tio, kion difinitaj rondoj intence kaj sisteme diskonigas tra la Esperanto-Movado, N.E.M. estas nek kontraŭkomunisma, nek kontraŭkapitalisma, nek kontraŭ kiu ajn alia politika aŭ doktrina ismo, kun escepto de tiuj doktrinoj kaj sistemoj, kiuj neas la homajn rajtojn kaj fundamentajn liberecojn kiel formulitajn en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj. En N.E.M., same kiel en U.E.A. ekde ĝia fondiĝo en 1908, troviĝis kaj plu troviĝas apartenantoj de diversaj religioj kaj politikaj partioj, inkluzive diversajn socialismajn kaj komunismajn, sed ĉiuj kunligitaj per la deziro progresigi Esperanton surbaze de la esence homa humaneca internaciismo. Tio ne nur ne endanĝerigis la neŭtralecon de la ĝis-hamburga U.E.A., sed, male, firmigis ĝin. *Tute alia afero estas akcepti partipolitikajn Esperanto-instancojn, agantajn strikte laŭ la instrukcioj de la partio, kiel aliĝintajn asociojn kun multnombraj komitatoj en la supera organo, la Komitato de U.E.A.* Tio — ne tiu aŭ alia politika konvinko de unuopuloj agantaj libere laŭ siaj konsciencoj — kaŭzis la unudirektan politikigon de la Asocio kaj la perdon de ĝia sende-

pendeco. N.E.M. batalas kaj plu batalos kontraŭ la ekkaperon de U.E.A. fare de difinita bloko, same kiel ĝi batalus kontraŭ la ekkaperon de U.E.A. fare de kiu ajn alia politika partio aŭ politika bloko.

- 6) *Alvoko*. — N.E.M. fariĝos superflua kaj ĉiuj ĝiaj apogantoj donos la plej fortan subtenon al U.E.A., kiam U.E.A., eble post multaj pliaj malagrablaj spertoj, revenos al la tradicia vojo de partipolitika neŭtraleco, hodiaŭ eble pli aktuala ol iam antaŭe, konforme al sia propra Statuto, ankoraŭ formale ne ŝanĝita. Nur tio ebligos vere efikan agadon por la Internacia Lingvo en la nunaj escepte favoraj eksteraj cirkonstancoj. N.E.M. alvokas ĉiujn sincerajn esperantistojn, inkluzive funkciulojn de U.E.A., konsciiĝi pri la graveco de la krizo kaj helpi, ke U.E.A. retrovu sin mem kiel eble plej baldaŭ en la intereso de U.E.A. mem kaj, multe pli grave, de Esperanto. Intertempe N.E.M. laŭ siaj eblecoj plu klopodos disvastigadi Esperanton kaj tiujn ideojn de humaneco kaj tuthoma, pura internaciismo, kiuj estas nedisigeble ligitaj al ĝi.

En Ateno, la 15-an de septembro 1979.

Prezidanto: Prof. d-ro Ivo Lapenna (Britio).

Vicprezidantoj: Prof. d-ro St. Anagnostakis (Grekio), mag. I. Dratwer (Israelo), s-ro G.

Griniatscs (Grekio), Prof. d-ro O. Pancer (Jugoslavio).

Sekretario: Mag. K. Zaĥarakis (Grekio).

SPECIALA NOVJARA DONACO AL «HORIZONTO»

La 5-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado aprobis la proponon de Prof. Dro Ivo Lapenna prezenti al *Horizonto* specialan novjaran donacon kiel signon de rekono pro la pozitiva rolo, kiun la revuo ludas en la nuntempa Esperanto-Movado, kaj por certigi ĝian pluan regulan aperadon. Jen la nomoj de la donacintoj:

La 5-a Internacia Konferenco de N.E.M.	10 000	drahmoj	
Ges-roj A. kaj S. Sakellaropoulos	4 000	»	
Prof. Dro S. C. Anagnostakis	1 000	»	
F-ino B. Poulidou	500	»	
S-ino K. Diamanti	500	»	
Ges-roj Mag. I. Dratwer	1 000	»	
S-ino M. Müller	300	»	
	17 300		Pesetoj
			30 240
Prof. Dro O. Pancer 10 USA dol.			658
Dro K. Perko 500 aŭstria ŝilingoj			2 530
F-ino M. Vermaas 300 ned. gld.			9 867
Prof. Dro I. Lapenna 300 ned. gld.			9 867
Ges-roj H. Müller 150 ger. markoj.			5 500
H. V. Rasmussen 100 danaj kr.			1 300
S-ino S. Koivu kaj S-ino E. Taskinen.			8 500
S-ro P. Zacho			10 000
			78 462

La legantoj de *Horizonto*, kiuj deziras kontribui por tiu speciala celo, povas sendi siajn donacojn rekte al la Administracio de *Horizonto*.

DONACOJ POR «HORIZONTO» - 1979

<i>Gisnuna sumo</i>	13.150	ptoj.	
Karl-Heinz Mischler, Zürich (Svislando)	200	»	Sirkku Koivu kaj Elli Taski- nen, Helsinki (Finlando) ... 8.500 »
M. Díaz Camacho, Los Llanos Aridane (Hispanujo)	400	»	Anonime (Germanujo) 7.358 »
			29.608 »

VI-a INTERNACIA KONFERENCO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO Strasburgo, 26 julio - 1 aŭg. 1980

Konstanta adreso ĉe: S-ino M. Muller, 80 Bd. Clemenceau, 67000 Strasbourg, Francujo.

Frua aliĝo estas grava helpo por la organizantoj!

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED)

Redaktas Prof. Ivo Lapenna
N-ro 17

28 REDAKCIA NOTO

Pro la foresto de la redaktoro de ED dum preskaŭ tri monatoj en Aŭstralio, kie li prelegis kiel gastprofesoro en la Jura Fakultato de la Universitato de Sydney kaj, parte, en tiu de Canberra, ne estis eble prizorgi la redaktadon de tiu ĉi rubriko. Nun ĝi reaperas.

Dum sia restado en Aŭstralio la redaktoro prelegis pri «La Perspektivoj de Esperanto en la Nuntempa Mondo» en plenŝtopita salono de la Esperanto-Societo de Sydney, kaj pri «Bazaj Principoj de Parolarto» en la Esperanto-Grupo de Manly, unu el la distriktoj de Sydney. En Canberra okazis amika renkontiĝo en la gastama hejmo de Ambasadoro Ralph Harry, nun Direktoro de la Aŭstralia Instituto pri Internaciaj Aferoj kaj vicprezidanto de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj.

29 PARTIPOLITIKA PROGRAMO DE A.S.E.

La ĉefartikolo en n-ro 4/79 de *Horizonto* koncize prezentis la rolon de la t.n. «sociaj organizaĵoj», inkluzive, kompreneble, la ĵus fonditan Asocion de Sovetaj Esperantistoj (ASE), konforme al la Soveta Konstitucio, precipe ĝia art. 6. En la artikolo estis dirite: «Apenaŭ necesas kia ajn komento: pli ol evidente, ASE kaj ĝiaj filioj devas agi laŭ art. 6 de la Konstitucio, nome strikte observi la oficialan partipolitikan linion kaj la konkretajn direktivojn de la Komunista Partio, la 'nukleo' de ĉiuj 'sociaj organizaĵoj'».

Kompreneble, tiu antaŭvido, same kiel ĉiuj aliaj antaŭvidoj lige kun la hamburgaĵ eventoj, plene realiĝis. Laŭ *SAT-Amikaro* de julio, 1979, ASE anoncis la fondiĝon jene:

«...La partoprenintoj de la konferenco unuanime decidis konsideri la ĉefajn taskojn de la Asocio kaj de la enirantaj ĝin organizaĵoj; la partoprenon, uzante Esperanton, en la firmigo de la paco, sekureco kaj kunlaborado; helpadon al esperantistoj en lernado de Esperanto kaj profundigo de ĝia scio; edukon de la Sovetiaj Esperantistoj en la spirito de patriotismo kaj internaciismo, malkompromisemo koncerne la reakcian ideologion, faŝismon, koloniismon, rasan diskriminadon kaj socian maljuston...»

Laŭ la sama gazeto, Prof. D-ro Mohamed Isaev, prezidanto de ASE, skribis interalie:

«Ankoraŭ kaj refoje indas emfazi, ke la lingvo Esperanto, same kiel ajna alia lingvo, estas ilo, ilo por komunikado. Per si mem ĝi portas nenian idean (el socia signifo de la vorto) ŝarĝon. Oni povas uzi ĝin tiel por bono, kiel por malbono. La plej multo de Sovetiaj Esperantistoj kaj interlingvistoj antaŭe kaj nun bazigis sur tiu fundamenta marksisma-leninisma difino de la lingvo. Kaj en sia agado estonta la Esperantistoj devas konstante memori pri tio por ne allasi domagajn erarojn...»

R. Grandière komentis en la menciita numero de *SAT-Amikaro* la koncernajn partojn de la prezidanta deklaro jene:

«Tiu ĉi deklaro de la Prezidanto de A.S.E. en gazeto «*Moskvaj Novaĵoj*» estos favore akceptata de parto de la esperantistaro. Alia parto ĝin refutas, kaj ne bonvole pretos kunlabori kun tiu specife neneŭtrala, naciema, nova asocio. Verŝajne, ni ne atendos longtempe la konsekvencojn de tiu reapero de Sovetiaj Esperantistoj sur la tutmonda scenejo. Scivoleme la esperantistaro observos, ĉu la prognozoj aperintaj en «*Hamburgo en Retrospektivo*» realiĝos, aŭ ne.»

En la nuna momento (fine de aŭgusto) ankoraŭ ne estas konate, ĉu la Komitato de UEA en Lucerno lasis en la nova statutprojekto la kontraŭneŭtralecajn klaŭzoj, precipe la regulon, kiu ebligas, ke eĉ *evidente malneŭtrala, politika* instanco rajtas aliĝi al UEA kiel «aliĝinta landa asocio» (art. 13 de la projekto), kio jure kaj fakte senigas la Komitaton de la ebleco rifuzi la aliĝpeton. Ankaŭ ne estas konate, ĉu ASE (aŭ eĉ ĝiaj unuopaj sekcioj en la 15 respublikoj?) jam petis aliĝon, kvankam plej kredeble tio baldaŭ okazos, se ĝi ne estas jam farita, ĉar ĝuste tio estas la senco de la fondiĝo. Same kredeble, pro la nuna konsisto de la Komitato de UEA, tiu evidente partipolitika instanco (aŭ eĉ ĝiaj sekcioj en la 15 respublikoj aparte?) estos akceptitaj, kio signifos kompletan ekregon de la Asocio fare de *ekstermovadaj politikaj fortoj*. Tial provizore, ĝis klariĝos tiuj demandoj, ni prefere ne analizos la sencnon de la esprimoj «paco», «sekreco kaj kunlaborado», «patriotismo kaj internaciismo», «reakcia ideologio, faŝismo, koloniismo, rasa diskriminacio kaj socia maljusto» en la *soveta*, ne rusa, Internacia aŭ kiu ajn nesoveta lingvo. Ni prokrastas, ĉar en la kadro de la neŭtrala Esperanto-Movado nin ne interesas la partipolitika programo de ASE, se ĝi restas ekster UEA. Tio estas afero de la esperantistaro en Soveta Unio. Se la Internacia Lingvo fakte komencos disvastiĝi en tiu granda lando, ni fidas ke unuopaj Esperanto-parolantoj trovos la eblecon komunikadi kaj interŝanĝadi ideojn kun ordinaraj esperantistoj en aliaj landoj ankaŭ ekster la oficiala linio. Principe, nin interesas nur la sorto de la iam partipolitike neŭtrala UEA kaj entute la sorto de la neŭtrale homa Internacia Lingvo, inspirita de neŭtrale homa humaneca internaciismo.

Ni tamen atentigas pri ĉap 3.2 de *Hamburgo en Retrospektivo*, en kiu estas prezentita la vera senco de la *soveta* «proleta internaciismo», diference de la normala, humaneca senco de la esprimo «internaciismo» kaj eĉ de la originala marksisma koncepto de «proleta internaciismo», kiel komprenata de Marx kaj Engels kaj kiel klare formulita en la *Komunista Manifesto*.

Aliflanke ni ne povos ne dediĉi apartan artikolon en la sekvanta numero de *Horizonto* al la profunde erara, science nedefendebla «fundamenta marksisma-leninisma (pli frue: «marksisma-leninisma-stalinisma», mia rim.) difino de la lingvo», laŭ kiu «ĝi (la lingvo) portas nenian idean (en socia signifo de la vorto) ŝarĝon».

Guste tiu «idea ŝarĝo», nome idea aspekto, estas la kvintesenco de la lingva problemo en la mondo kaj tial esence grava por la kompreno de la signifo kaj rolo de la Internacia Lingvo.

Estus ankaŭ tre utile, se almenaŭ la sinceraj esperantistoj en la Komitato de UEA (tiaj ekzistas) legus aŭ relegus ĉap. 3.1 de *Hamburgo en Retrospektivo* rilate al SAT kaj la siatempa *Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE)*. Ĉi tie ni memorigas nur pri p-to 6 de la Gvidrezolucio de IPE, akceptita en 1932, kiu tekstas laŭvorte:

«6. La laboristaj esperantistoj plene subtenas la devizojn de la proleta internaciismo, batalas kontraŭ imperialismo kaj faŝismo, subtenas la liberigan batalon de la supremataj nacioj kaj koloniaj popoloj, kontraŭ la supremantaj kaj sialandaj burĝaroj...»

Oni komparu tiun punkton 6 de la jaro 1932 kun la nuna programo de la ĵus fondita ASE kaj kun la deklaro de ĝia prezidanto, kaj oni mem konkludu. La likvido de IPE kaj la tragika sorto de ĝia gvidantaro malgraŭ la p-to 6 estas bone konataj.

30 FRANCA ROTARIA REVUO PRI ESPERANTO

Plenaj dudek grandformataj paĝoj de la luksa franca periodaĵo *Le Rotarien* (Franca Rotaria Revuo) estas dediĉitaj al Esperanto en la maja numero. La artikolaron enkondukas Claude Chappat, membro de la Centra Konsilio de Rotario Internacia. En la kazo troviĝas tekstoj de konataj rotarianoj, inter kiuj R. Levin, D-ro P. Rizzo, K. Söderberg, K. T. Knol kaj N. Williams. Traduko de parteto de *Esperanto en Perspektivo* prezentas la lingvan problemon en Unuiĝintaj Nacioj. Aparte gravaj estas la kontribuajoj de Claude Piron kaj Jean Thierry. La tuto estas riĉe ilustrita per portreto de D-ro Zamenhof kaj diversaj fotoreproduktaĵoj, inkluzive kovrilpaĝojn de diversaj Esperanto-periodaĵoj. Oni povas esperi, ke tiu unika numero de *Le Rotarien* kontribuos al disvastiĝo de Esperanto en rotariaj medioj.

PRI LA LANDNOMOJ

Kiam la 4an de februaro 1974a la Akademio de Esperanto enlasis la sufikson «i» por landnomoj, la organo de U.E.A. tuj delasis la fundamentan formon, kaj la io-teorio, io-opinio aŭ io-manio invadis la gazeton. Estas kurioze, ke tio fariĝis sen videblaj protestoj. Sendube, la lingve malkonservativaj movadoj feliĉiĝis post tiu akademia decido; mi memoras germanon, kiu en Bruselo (U.K. en 1960a) diris kolekte al mi: «Neniam mi diros Francujo!». Al tio mi respondis trankvile: «Neniam mi diros Francio!».

Tiu malnova ŝanĝo de la landnomaj finigoj estas, kiel diris Prof. Cart en sia libreto pri la landnomoj en la j. 1927a, neniel bagatela deflankiĝo de la Fundamento; kaj la novigo kaŭzis tian duobleccon, ke post 52 jaroj la uzado ankoraŭ ne decidis elekton. La kuna uzado de *lando*, *ujo*, *io* plu daŭras kaj probable daŭros plu.

La fundamenta UJ antaŭ tribunalo

Dum teoriantoj povas plektiĝi en silogismojn — eĉ falsajn — kaj sofismojn, praktikantoj provas per faktoj. Tial, antaŭ ol komenci la trastudon mi solene deklaras ke «neniam dum mia pli ol sesdek-jara uzado de la landnoma UJ mi prispertis la plej etan dubon aŭ miskomprenon pro ĝi». Malgraŭ tiu fakto, plene sufiĉa kaj kontentiga, mi pruvos la taŭgecon de la Fundamenta formo, sciante

ke jam de la unua tempo oni atakadas ĝin tiom, ke Zamenhof mem, premate de reformemuloj, proponis la formon «i».

La tricbla signifo de UJ — precipa kaŭzo de ĝia malsatateco — estas plene kongrua laŭ la principo de «sufiĉeco», kiun la naturaj lingvoj aplikadas konstante. La francaj HUILE, HUILIER, estas Oleo, Oleujo; POMME, POMMIER, estas Pomo, Pomujo (arbo); ENCRE, ENCRIER, estas Inko, Inkujo. La katalunaj OLIVA, OLIVERA, estas Olivo, Olivujo (arbo); CARBASSA, CARBASSERA, estas Kuburbo, Kuburbujo (planto); kaj VINAGRE, VINAGRERA, estas Vinagro, Vinagrujo. La hispanaj SAL, SALERO, estas Salo, Salujo; TRAPO, TRAPERO, estas Cifono, Cifonisto. La supre nomita HUILIER, estas krome Oleisto kaj ankaŭ la Faristo aŭ Vendisto de oleujoj. Tiun tro vastan kaj heterogenan signifon de sufiksoj, Zamenhof limigis «je la naturaj nuancoj de unuopa, ne preciza koncepto». Por ekzemplo ni prenu la sufikson AN, kiun oni neniam kalumniis malgraŭ ĝia triobleco. Kun Nacio, rezultas NACIANO, nome: La membro de la nacio, la loĝanto de la nacio, la adepto aŭ defendanto de la nacio! Tri aspektoj de la sama koncepto.

Ni uzas la sufikson UJ por la baza ideo «io enhavanta»: Salujo, Pomujo, Rusujo, kaj oni memoru, ke «la sufiksoj rezultigas vortojn, kies signifoj estas kondiĉitaj de la radikoj». Tial la loka senco de EĴ

difiniĝas klare nur per la radikoj: Ĉevalejo estas Stalo (pro ĉevalo); Panejo estas Butiko (pro pano); Lernejo estas Domo (pro homa ago); Lupejo estas Densa arbaro (pro Lupo). Simile kun UL; ĝian sencon de «viva estajo» difinas la radikoj: Sanktulo estas Homo (pro homkvalito); Rampulo estas Besto (pro rampado); Trimastulo estas personigita ŝipo.

Jen la konkludo pri AN: Kun nomo de homo ĝi signifas adepton: Kristano, Zamenhofano; kun nomo geografia, ĝi signifas loĝanton: Bruselano, Insulano, Montarano; kun nomo de asocio, ĝi signifas membron: U.E.A.-ano; Federaciano. Resume: AMERIKANO estas loĝanto, KRISTANO estas adepto, KLUBANO estas membro. Sen ombro de dubo.

La rolo de la malamata UJ estas identa: Kun nomo de Gento, ĝi donas la Landon; kun nomo de Frukto, la arbon (1); kun nomo de likvo aŭ de dismetebla substanco ekz. Pulvoro, ian vazon. Resume: RUSUJO estas Lando, POMUJO estas arbo, INKUJO kaj SUKERUJO estas iaj vazoj. Estas erare diri Fruktujo anstataŭ Fruktarbo. La nomon de la arbo oni ricevas per UJ nur el la nomo de ĝia frukto: Figo - Figujo, Grenato - Grenatujo. Tial Fruktujo estas la plado, vazo aŭ Korbeto por surtabligi fruktojn.

Inversi la signifon de la vortoj kun UJ, povas nur frenezulo. Unue la Fundamento, kaj pli poste la literaturo kaj la ĝenerala uzado fiksis jam de longe ĝian rolon, same kiel la naturaj lingvoj laŭ la ekzemploj pli supre donitaj. Tial estus pli ol absurde kompreni vazon en Rusujo, landon en Pomujo kaj Arbon en Inkujo. Esperanto ne estas tia abstrakta, teoria, logika, filozofia, matematika lingvo en kiu ĉia absurdaĵo estas ebla, pro la manko de intervortaj efikoj kaj pensilatoj. Tamen, en grava verko la aŭtoro demandis: «Kio estas KAFUJO?» Ĉu la kruĉo aŭ la arbo?» Mirige! Kial li ne demandis unue Kio estas Kafo? Ĉar se al unu sama vorto ni donas du malsamajn signifojn, la almeto de sufikso rezultigos ankaŭ du egalajn vortojn sed malegale signifajn pro la radikefiko. Laŭ la vortaro KAFO estas semgrajno, do solida frukto, kaj tial Kafujo estas nepre la arbo de kafo, same kiel Pomujo estas arbo de pomoj (1). Sed la kafon oni ne manĝas nek trinkas: Oni ĝin rostas, muelas, infuzas aŭ dekoktas kaj filtras. Pro oportunemo, tiun infuzajon aŭ dekoktaĵon oni simple nomas Kafo, same kiel oni nomas Teo la te-infuzajon. Kaj, se al milionoj da homoj la ĉiumatena Kafo estas pretigita likvo, ili nomas simple Kafujo tiun kuirpoton aŭ servopoton, kies ĵusta nomo estus Kafinfuzaĵujo, aŭ Kafinfuzilo aŭ Kafinfuzaĵservilo. Oni ŝatas vortetojn, sed ne vortegojn. La hispanoj nomas Kafo eĉ nian Kafeton (Kafinfuzaĵtrinkejo), kaj la franca Cafetière (kafujo) foje aludas ies kapon, nomatan ofte de katalunoj Kruĉo (Tupi)!

Jen kelkaj frazoj koncizaj: Trinku ka-

fon, ŝovu al mi la kafujon, oni importis mil sakojn da kafo, en nia lando ne kreskas kafujoj, li rostas kafon, mi atendos en tiu kafejo, kafmuĉilo, taso da kafo, ni fabrikas metalajn kafujojn, ili kultivas kafujojn altajn je 5 metroj, k.t.p. Kiu leganto ne komprenis ilin tuj, ne hezitante, malgraŭ la koncizeco?

UJ, radike uzata

Ĝi aperis post 25 jaroj, do ĉ. la jaro 1912a. Oni argumentas, ke neniam ĝi signifas arbon nek landon, sed «objekton destinitan enteni ion». Tute ĝuste; sed dum ni povas difini la landon Svisujo kiel Sviso-lando, kaj Pirujon kiel piro-arbo, ni ne povas difini la Benzinujon de aŭto, nek la Akvujon de lokomotivo. Nek Vazo nek Poto taŭgas; eble Rezervujo, sed kiel difini ĝin? EJ signifas lokon, IL instrumenton. AR kolekton... sed kion, pro la diablo signifas UJ? Pro la manko de tiu vorto, logike UJ anstataŭis ĝin por tiu koncepto, tiel ke ni parolas nun pri arboj, landoj kaj... ujoj. Estas strange: Kiam svarmas tiom da neologismoj, la malfeleca UJ ne trovis sian vorton.

La poŝto

La fakto ke poŝtistoj ne scias legi esperantaĵojn, ne pravigas ŝanĝon de sufikso. Dum la monda poŝto ne uzos Esperanton, oni devos skribi en la naciaj lingvoj. Franca poŝtisto la nomon Danujo legas Danujó, kaj hispana legas Danuño. Esperanto ne estas nek devas esti «naturalisma latinidaĵo». Eĉ internaciaj radikoj ŝanĝas la mienon pro la elementoj per kiuj la lingva meĥanismo vestas ilin, ekzemple Svisujo, Lernejo, Mangilaro, Sablero. Ĉu do ni forigu aŭ ŝanĝu tiujn sufiksojn pro la malnaturigo de la vortoformoj?

La nacioj

Eŭgeno Adams (Lanti) pro sia sennaciismo estis la ĉefa kontraŭulo de la landnoma UJ. Lia skolo obstine evitadas ĝin kaj neniam volis reveni al la fundamenta sufikso. En la jaro 1923a, Ludoviko Glo-deau, tiama administranto de S.A.T. kontente rakontis al mi ke Prof. Cart, prezidento de nia Akademio, paliĝis de kolero aŭdinte de li *Francio*. Estante adeptoj de unu komuna lingvo, ni antaŭpreparas unu solan popolon; sed tamen, estas evidente ke ekzistas landaj kaj naciaj homgrupoj kun apartaj trajtoj, do ne identaj, ĉar de longe ni ne estas nomadoj travagantaj la Teron. La forigo de la landnoma signo ne forigas la nacianecon aŭ landanecon. Iluzia solvo. Kaj la skolo de Lanti, tiel multe farinta por Esperanto, ŝanĝante sufikson nun malfavoris ĝin. Estas do tre klare, ke nek la gramatiko, nek la teorio, nek la praktiko pravigas la ŝanĝon de la landnoma UJ. Kial do nia Akademio nuligis sian decidon faritan per 74 voĉoj kontraŭ nur 5, en la jaro 1922a kontraŭ la enlaso de la novigo «io»? Restas nur la perso-

naj gustoj, per kiuj ni povus facile ruinigi nian tutan Aferon; sed ankaŭ la sekvojn de tiu gusto mi volas traanalizi.

La mirakla IO

Estis espereble, ke malkontente pro la tri signifoj de UJ, oni elektus unusignifan sufikson per eviti problemon eĉ se nur imagitan; sed kiel ni vidas, la elektita IO kapabla signifi ĉion nur povas enmiksi pli da konfuzo en la landnomaron, krom la monotoneco rezultanta el la sama sono preskaŭ kontinua pro la ofteco: Direkcio, Administracio, Redakcio, Deklaracio, Civilizacio, Pestiĉio... kaj nun venis al mia penso: Dio, Mesio, Eklezio, Evangelio, Anunĉio, Liturgio, Letanio, Sakristio, Konfirmacio, Komunio, Hostio, Kalvario, Krematorio, Kremacio, Purgatorio... Post ĉio tio jam restus nenio krom la Diabolo, kiu en la infera kapelo pro antipatio kontraŭ analogio baptis sin nur Mefistofelo kaj neniel Mefistofelo.

La tabelo de ĥemiaj elementoj konsistas el 108 vortoj, el kiuj 60 finiĝas per IO, do 55,5%! (Aktinio, Berilio, Cerio, Deŭterio, Erbio k.t.p.) Por arto, teĥniko, scienco, oni uzas ofte la finiĝon IO laŭ la listo de sciencaj vortoj havantaj vinjeton en P.I.V.: El tiuj 80 vortoj 29 finiĝas per IO, do 36% (Astronomio, Biologio, Farmacio, Mitologio k.t.p.) Multaj landnomoj finiĝas per IO ne sufiksa: Maŭritanio, Jordanio, Alĝerio, Bolivio, Liberio k.a. ĝis 32. Ankaŭ pluraj urbonomoj finiĝas per IO: Filadelfio, Novdelio, Tokio, Varsovio, Brazilio (La lando estas Brazilo!), Valencio, Karaĉio...

En la serio de la vortoj kun IO estas konsiderindaj la 5 vortoj de la tabelo: IO, Nenio, Ĉio, Kio, Tio, ofteĝaj en la lingvo.

Mi esploris la serion sub litero K de P.I.V. kaj trovis ke el malpli ol 900 vortoj, 79 finiĝas per IO, do 9,06%. En la serio de litero A de P.I.V. mi trovis ke el malpli ol 1400 vortoj, 176 finiĝas per IO, do 12,8%. Evidente, neniu alia vortfiniĝo estas tiel ofta, kio pruvas ke la enlaso de IO por landnomoj neniel favoras la sonvariecon, sed male, la monotonecon fakte ne naturan kaj pezan por la ne diftonge de la vokaloj en Esperanto, eĉ kiam en la naciaj lingvoj ofte ili sonas diftonge. La hispana «Ministerio» sonas Ministerjo kaj ne Ministerio.

La internacieco

Vortoj rezultantaj el la meĥanismo de la lingvo, neniam prezentos internacian formon. Por ekzemplo, Germanujo aŭ Rusujo ne estas forme pli internaciaj ol Katinio, Vendejo, Rompiĝi aŭ Bonulo malgraŭ la konekteco de iliaj radikoj. Tio estas la logika sekvo de l'monde valida aglutineco de Esperanto, kaj ĝuste tio distingas ĝin de la naturalisma skolo valida nur en parto de Eŭropo. Voki, en la nomo de la internacieco la sufikson IO por landno-

moj estas plena malkonsekvenco, al kiu oni facile venis: Kanadio, Koreio, Urugvio, Senegalio, Israelio, Danio k.a. kies IO faris ilin ĝuste malinternaciaj.

La landaj nomoj ne estas trakteblaj kiel la komunaj, kiel Pomo, Sablo, Fero, ĉar ili estas propraĵo de grandaj homgrupoj, kiuj pro historiaj aŭ etnaj faktoroj rajtas decidi pri la preferataj nomoj. Simile pri la nomoj de urboj. Fakte la novaj landoj jam elektas sian nomon, kaj ni vidis eĉ nomŝanĝojn. La tutmonda opinio ne rajtas trudi nomon al difinita popolo, ĉar la internacieco de la nomo devas esti la rezulto sed ne ĝia kaŭzo. Hispanoj nomas la urbon Antverpen (Amberes, Munĉen (Muniĉ) kaj Genève (Ĥinebra), kio estas ne proponinda monstraĵo al la respektivaj popoloj. Simile okazas al pluraj landoj, kiel Cungkoo (Ĉinujo), Taĥano, Coseno (Koreo), Nipono (Japanujo), Misro (Egiptujo), Bharato (Hindujo) k.a.

La lingvoj de l' popoloj estas tiuj de la vivantoj, la vivanta, la parolata lingvo, kies materia formo estas la grafika, funkcianta laŭ propraj reguloj. Tial la hispanaj nomoj Francia, Rusia, Grecia, España nur trompe pravigas la novigon Francio, Rusio, Grekio kaj Hispanio, ĉar ili sonas vivalingve Francja, Rusja, Grecja, Espanja, unusilabe, diftonge, flue. Flandroj skribas Spanje, germanoj Spanien, francoj Espagne (Espanj). Ĉie diftonge. Kie do oni trovis motivon por Hispanio kun akcentita I?

En sia tempo P. Christaller (2) en la j. 1914a proponis la apostrofadon de la U de UJ: Hispan'jo, Rus'jo k.t.p. kio estis pli konforma je la faktoj. La bazo por esperantigo devas esti la parolataj lingvoj, sed ne la grafikaj rimedoj per kiuj ili manifestiĝas al niaj okuloj. Efektive, nur sone povas eniri en nian vortaron la vortoj de malsamaj alfabetoj (araba, greka, japana, k.a.).

En la nomo de la internacieco neniu teorianto rajtas pledi plu por la reformado IO por landnomoj kaj estus vana celo ilia unuformigo. En la Deklaro de la «Internacia Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj» (3) troviĝas mallonga sed grava paragrafo: «Tial la geografiaj nomoj ne estas konsekvencaj laŭ iu regula skemo, sed liberaj individuaj unuoj kiel nomoj de personoj, montoj, objektoj». Pri la esenco de tiu deklaro, ni reparolos.

Konfliktoj

Ĉar UJ troviĝas en neniu sensufiksa landnomo, la almeto de UJ signifas, ke ĝia radiko estas genta: Rusujo - Ruso; sed ĉar IO troviĝas nesufikse en 32 landnomoj kaj ilian genton oni difinas per AN (Libio - Libiano), la anstataŭigo de UJO per IO liveras aliajn 49 vortojn, kun IO, sume 81. Nu, el tiom da samfiniĝaj nomoj, kiel oni povas scii, ke la ĝustaj vortoj estas Boliviano kaj ne Bolivo, Jordano kaj ne Jordano, Etiopiano kaj ne

Etiopo (hispane Etiope); sed Franco kaj ne Franciano, Polo kaj ne Poliano k.t.p.?

Duan konflikton prezentas la silabo AN nesufiksa troviĝanta en nomoj geografiaj kaj gentaj, kun la sufiksa: Gvajano, Butano, Bostvano, Pakistano, Irano, Libano, Sudano kaj Vatikano estas geografiaĵoj; sed Afgano, Japano, Albano, Dano, Germano, Hispano, kaj Rumano estas homoj. La lastaj faras la landon per UJ, la unuaj faras la genton per AN: Gvajano, Butano, Bostvano, Pakistano k.t.p. sed Afgano, Japano, Albanujo k.t.p.

Trian konflikton prezentas la silabo LAND: Novzelando, Tajlando, Srazilando, Islando, Skotlando, kaj ofte (eble pro radika unusilabeco) Pollando, Svislando kaj Finnlando. Oni diras Novzelandano, sed Skoto; Tajlandano, sed Polo; Srazilandano, sed Sviso; Islandano, sed Finno.

Kontraŭ tiuj du direktoj lando — gento kaj gento — lando, nur povas helpi fidela memorkapablo. Post tio mi ne miras, ke fervojisto diris: «Tie estas la svedanoj», kaj ĉar mi korektis «svedoj», li replikis serioze: «Ne, la svedanoj!» Alia diris «La katalunanoj jam venis, la germanoj ankoraŭ ne». Fine, estas tre klare, ke la enlasita IO por landnomoj, absolute ne helpis, sed pli komplikis la rebuson.

Manko

En la malnova mondo, la landoj kun UJ ebligas klaran distingon: Ruso - Rusujo - Rusujano. La unua estas landido, la tria estas eventuala loĝanto, sed ne naskita tie. Eugeno Lanti, antaŭ preskaŭ 60 jaroj verkis artikolon por Moskva ĵurnalo: «Ĉu Francio perdos sian francecon»? La argumento estis ĝuste la nombro de alilandaj homoj loĝantaj en Francujo. Mia kara Lanti, agnoskis per tio, malgraŭ sennaciismo, la distingon, kiu ankoraŭ daŭras 60 jarojn poste kaj certe daŭros plu.

Estus iluzie forigi vorton por forigi fakton. Tre longe ankoraŭ la homoj distingigos per la «stampo» de sia naskiĝloko: Lingvo, moroj, klimato, edukado kaj leĝaro, ĉar ili ne estas nomadoj kaj naskiĝas en malsamaj urboj de malsamaj provincoj de malsamaj landoj de malsamaj mondopartoj, kio tamen ne pravigas rasismon nek naciismon. La landidoj ĝenerale rajtas grumbli, protesti, kritiki kaj eĉ insulti en sia lando; sed eventualan landanon oni facile «elpordigas» pro nedezirindeco.

Nu, la anstataŭigo de UJ per IO ŝanĝas nenion tiurilate. La supra frazo fariĝas Ruso - Rusio - Rusiano.

Dum en la hispana la vortoj senescepte adjektivaj (apartenaj): Senegalés, Tunecino, Indonezio, Chileno, Portugués, Español, Sueco, k.t.p. uzataj kiel substantivoj difinas la respektivajn landidojn de la tuta landaro kaj ne la eventualajn loĝantojn por kiuj mankas specialaj vortoj aŭ sufiksoj, en Esperanto ni povas distingi nur 49 landidojn (6 en Azio, 2 en Afriko kaj

41 en Eŭropo) kies landnomoj finiĝas per UJ, kio pruvas ke la vortradikoj estas gentaj: Ĉinujo - ĉino, Egiptujo - egipto, Svedujo - svedo. Ekster tiuj 49 landoj, troviĝas 85 sen UJO, sen IO, sen Lando (Maroko, Kanado, Ĉilo) (4); 32 kun IO nesufiksa kaj 6 kun Lando, sume 123 landoj por kies idoj kaj anoj mankas distingilo. Laŭ la uzado, Marokano loĝanta en Tunizio estas Tuniziano, kaj li ne povas nomi sin Marokano ĉar li ne loĝas en Maroko. Por esprimi sian idiosinkrazian Marokidecon li ne trovas rimedon en la AN de la Mondmapo. Se naskito en Brazilo asertas ke li estas Brazilano, li diras malveron se li loĝas en Peruo. Sendube oni ĝenerale konsentas, ke tiu maldistingo ne kongruas kun la klareco de nia lingvo, kaj la enlaso de IO naskas nur kolizion de 49 vortoj kontraŭ 32 aliaj.

La historio

Pro la historio ni havas duoblan sistemon. En la malnova mondo, precipe en Eŭropo, difinitaj gentoj okupis lokojn, kiuj tial ekhavis la nomon de la okupintoj: Francoj - Francujo. En la praktiko, tio estis multe pli malsimpla, sed tamen ne interesa por nia temo. En la nova mondo, mikstaj nedifinitaj gentoj okupis lokojn, per kies nomoj ili distingigis: Ĉilo - ĉilano. Ankaŭ tio okazis pli malsimple sed la detaloj ne interesas nin.

Faktoj

Sendepende de tio, ĉu difinita gento iam okupis terspacon, restadis plu sur ĝi kaj donis al ĝi sian nomon; aŭ male, ĉu difinita loko donis nomon al siaj loĝantoj, post unu generacio (jam plenumiĝinta) la homoj mortas, la loko restas kaj «stampus» permanente sian idaron, kiel jam dirite. Nun, oni do estas kataluno, japano aŭ svedo ne pro estinta gento aŭ raso (neniam fajna) sed ĉar oni naskiĝis en difinita lando, kies filo oni estas. Tio validas eĉ por Israelo, por la novaj landoj de Afriko, kaj tiuj de Ameriko. Nur unu generacio povas esti la «patro» de sia lando. La ceteraj estas nur pasemaj filoj venantaj en lulilo kaj forirantaj en ĉerko. Dume, la landoj restas, ripetante la ciklon.

La Problemo

Ne estas strange, ke dudirekta bazo (gento - gentlando) kaj (lando - landhomoj) kaŭzis problemon al serĉantoj de unueco de la landnomoj per la sufiksoj. Jam en la jaro 1933a la aŭtoroj de Plena Vortaro diris: «Ne estas nia tasko ekzameni la problemon pri unuecigo de landnomaj formoj; la estonto ĝin solvos, se solvebla, tiun problemon». Post 35 jaroj, do en 1968a, la menciita Komisiono por Ordigo de la Landnomoj faris la trafan pli supre formulitan deklaron: «Tial la geografiaj nomoj ne estas konsekvencaj laŭ iu regula sistemo, sed liberaj individuaj unuoj kiel nomoj de personoj, montoj, objektoj. Brave!

Forpasis la tempo de la filozofiaj-raciaj lingvoj. La signifon de vortradikoj ni scias per vortaro, kaj por ekzemplo, nenio en la vortoj Etno, Nilo, Ontario, Everesto, Peru, aludas, indikas aŭ komprenigas ke ili estas respektive vulkano, rivero, lago, monto, lando. Tute simple, sen sufiksoj. Per aplikado de tiu «senregula regulo» ni havus jam duonan solvon. Se por kvar geografiaĵoj ni ne uzas sufikson, kial por unu, la lando, ni devas uzi? Ni, senescepte, estas filoj, idoj de niaj landoj, kaj ne la patroj. Tial ni devas ricevi nomon laŭ la lando kaj ne doni nomon al ĝi.

Ni vidis ke la plej multaj landnomoj funkcias sen distingilo: Kubo, Meksiko, Panamo, Ĉilo, Nepalo, Maroko... ĝis 85, klare, kaj malpeze. Ankaŭ estas sensufiksaj (malgraŭ ŝajno) la tridek-du nomoj, kies finiĝo estas la ne diftonga IO, kiu, se grafike ĝusta, fonetike ofte ne ĝusta kiel la hispanaj Bolivia, Colombia, kiuj ne devus esti Bolivio, Kolombio, sed Bolivjo, Kolombjo, laŭdevene. Validas la sona, la viva lingvo, kiel ni diris pli supre. Se oni malkonsentas, oni diru al si kial la hispana Colombia ne esperantiĝis Colombia, laŭforme. Konsekvence ni devus diri — ĉar en tio malkongruas nenio — Gŭatemala, Nikaragŭo, Ekŭacoro, Gŭajano, Paragŭajo, Venezŭelo. Se oni ankoraŭ malkonsentas, oni demandu sin kial la Kostarika kapurbo nomiĝas Sanĥoseo, laŭ fonetiko, kaj ne Sanjoseo, laŭ formo; kial tiu de Portoriko estas Sanĥuano kaj ne Sanjuano, kial la Venezŭela Caracas estas Karakaso kaj ne Caracaso?

Certe, abundas la nomproblemoj inter fonetiko kaj grafiko, ĉar Esperanto ne havas nek povas havi ĉian literosonon; sed ĉar validas la parolata lingvo kaj ĉar ne estas esperantigeblaj, laŭ formo, la vortoj devenantaj de malsamaj alfabetoj, oni devas traskribi ilin laŭ ebleco. Ekz. ni diras Venezŭelo, ĉar la Z-sono hispana ne havas respondan en Esperanto. Tamen, pli ĝusta estus Venesŭelo.

El 151 landoj, nur 50 — la triono — funkcias kun UJ, kaj el tiu triono, 84 % en Eŭropo, t.e. 42. En la vastega spaco de Ameriko, Aŭstralio kaj Oceanio, troviĝas *neniu* lando kun UJ. En Afriko ni trovas nur du, Malgaŝujo kaj Egiptujo (sed Grabowski preferis Egipto). En Azio ni trovas ses: Afganujo, Ĉinujo, Hindujo, Japanujo, Mongolujo kaj Turkujo. La landnoma UJ estas do precipe Eŭropa. Cent aliaj landnomoj ne bezonas ĝin, kaj la diritan duonan solvon ni jam havus se ni evitus ĝin ankaŭ en Eŭropo, ne per anstataŭigo per IO — plia komplikaĵo — sed per uzado de propraj nomoj konformaj je la tiulandaj historio, geografio aŭ speciala cirkonstanco, decidotaj de la respektivaj interesatoj, la indiĝenoj, la landidoj, la solaj rajtintoj. La cetera mondo zorgu pri la siaj.

Tio estas la sola vojo al la solvo. Kleraj samideanoj de ĉiu lando prielektu konvenan nomon. Propraj nomoj kiel tiuj de montoj, riveroj, lagoj kaj vulkanoj. Se sonoj aŭ literoj ĝenas malkongrue, oni trovu mezan formon, eĉ se ne tre ĝustan etimologie. Zamenhof ne hezitis stumpigi vortojn por harmoniigi la lingvon. Post kelka tempo, tiuj vortoj ŝajnas naturaj (modifi, pordo, nepre k.m.a.)

Estas utile konsideri ke la landaj nomoj aperas en la uzado pli ofte ol la gentaj; oni eĉ personigas ilin kaj diras ekz. «Brazilo subskribis la Traktaton». Ankaŭ tial la nomoj estu simplaj. En sia lando oni skribas respektive Polska, Sverige, Belgique, Norge, Danmark, Hellas, Portugal, Ĉekoslovenko... k.t.p. kiuj supozeble (mi ne volas implikiĝi!) povus fariĝi Polsko, Sverigo, Belgiko, Norgo, Danmarko, Helaso (en P.I.V.), Portugal, Ĉekoslovenko... k.t.p.

Ekstereŭropajn landnomojn eŭropanoj konas laŭ la alnomo donita de ili mem, kio okaze povus esti eĉ insulta. En Azio oni decidu ĉu konvenas Cunkuo por la ĉina lando, ĉu oni preferas Koreo aŭ Coseno, ĉu Nipono taŭgas por la japana lando, ĉu Barato (en P.I.V.) estas ĝusta por la hinda lando... En Afriko oni decidu ĉu Egipto aŭ Misro (5). En la 32 landoj kun la ne sufiksa IO, oni decidu ĉu ĝi devas esti la akcentita IO, la neakcentita JO, aŭ simple forigita (ekz. Senegalo, Israelo).

Ni vidis sub *MANKO*, ke la sufikso AN kun landnomoj ludas duoblan rolon maldistingan, malkongruan kun la klareco de Esperanto. Se ĉiu lando havas sian propran nomon kaj ni rezervas al AN — en ĝia geografia nuanco — la signifon de *loĝanto*, ni bezonas trovi en la lingvo rimedon por distingi loĝantan landidon de tiu ne loĝanta.

Estas supozeble, ke la plej multaj landidoj vivas en siaj landoj; tamen, eĉ se loĝanta en Angolo, homo naskita en Senegalo estas landido de Senegalo, do Senegalido kvankam Angolano. Panamido povas esti Meksikano, kaj Brazilano povas esti Peruido ktp. Ni havas do la rimedon por distingo, inspiritan de la Zamenhofa frazo: «La hebreoj estas israelidoj ĉar ili devenas de Israel» (6). Ankaŭ ni venas de niaj landoj, ankaŭ ni estas landidoj ĉar naskitaj en niaj landoj. Sen ekstremaj subtilaĵoj tiuj AN kaj ID fundamentaj kaj uzataj en siaj respektivaj sencoj kun landnomoj senafiksaj, propraj, solvus kaj ĉesigus la hontigan haoson de la landnomo, nun plirebusigitan per la Akademia enlaso de tiu IO, troviĝanta kiel neafiksa finiĝo en 32 landnomoj.

Resume

1.º La landnomoj estu liberaj individuaj unuoj, kiel montoj, riveroj, vulkanoj k.a. ekz. Maroko, Peru, Ĉilo... ĝis 85, nun.

2.^o Sian landnomon elektu la landidoj mem.

3.^o La landofilon oni faru per ID: Israelido, Senegalido.

4.^o La landologanton oni faru per AN: Marokano, Peruano.

5.^o Loĝanteco ne signifas idecon: Enmigrinto en Peruon estas nun Peruano, kvankam li estas kaj estos ĝismorte Panamido se li naskiĝis en Panamo.

6.^o Ideco ne signifas loĝantecon: Homo naskita en Ĉilo estas kaj estos Ĉilido, kvankam nun li estas Meksikano, se li loĝas en tiu lando, Meksiko.

7.^o La adjektivaj formoj de lando, landido kaj landano, koncernas la respektivajn substantivojn (ĝis nun oni tion mikse maldistingis), ekz. Brazilaj montoj (de Brazilo); Brazilida elmigrado (de la brazilaj indiĝenoj); Brazilanaj manifestacioj (farataj de la loĝantoj en Brazilo).

8.^o Per personigo oni povas diri ekz. «Argentino protestos», el kio sekvas «Argentina protesto».

(1) Zamenhof: «La arbo sur kiu kreskas pomoj estas nomata Pomujo». En PIV sub Nom'.

(2) Paul Neergard, «Fremdvortoj en Esperanto», p. 43a.

(3) Nomita okaze de U.K.; en Varsovio en la jaro 1959a.

(4) Kontraŭ la Mondmapo oni nun diras Ĉilio, malinternacie.

(5) El Atlas de Nuestro Tiempo, Altamira, S. A. Madrid.

(6) Vidu sub VEN' en PIV.

Salvador Gumà

Nota: Tiu-ĉi artikolo estis jam verkita kiam aperis la pristudoj de E. de Kock kaj B. Golden. Tial, ĉia koincido aŭ malkoincido kun iliaj opinioj estas nur hazarda kaj kaŭzita de samtemeco. La atenton mi direktis al *nuna, praktika* solvo de la jam naŭzanta problemo, ekster la pratempaj nomoj de landoj, kies konturoj implikiĝis kaj malimplikiĝis laŭ la fluo de la homaj aventuroj.

S. G.

EL NIAJ FAKAJ ORGANIZAĴOJ

N-ro 1/1979 de Internacia Jura Revuo (IJR)

Fine de junio aperis n-ro 1/79 de *Internacia Jura Revuo*, 48-paĝa organo de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj.

En tiu ĉi numero oni povas legi artikolon de la redaktoro, Prof. D-ro I. Lapenna, pri «La Koncepto de Neŭtraleco en Internaciaj Rilatoj kaj Internacia Juro». Temas, fakte, pri la prelego de la aŭtoro, farita dum la 4-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, okazinta pasintjare en Jaca. La demando estas aktuala en la hodiaŭa mondo kaj la konkludoj de la analizo povas esti instruaj por ĉiuj. Kirsti Bull, docentino en la Universitato en Oslo, amplekse pritraktas la jurajn kaj sociajn problemojn de neregistrita geedzeco. Kand. jur. T. A. Høeg, la teknika redaktoro de la periodaĵo, tradukis la tekston de docentino Bull en Esperanton kaj faris grandan laboron por trovi taŭgajn fakajn terminojn. La artikolo-raporto de D-ro K. Perko pri la unua referendumo en Aŭstrio laŭ sia signifo vaste transpasas la limojn de tiu malgranda demokrata ŝtato pro la ĝenerala tendenco etendi la aplikon de referendumo en demokratioj al kreskanta nombro da brulantaj problemoj, koncernantaj la vivon de civitanoj kaj de la estontaj generacioj. En tiu ĉi numero estas publikigita la unua parto de la sugestoj de D-ro L. Dubravszky por kompletigo de la jura-diplomatia terminaro. La dua parto de tiu gravega terminaro aperos en n-ro 2/79 fine de tiu ĉi jaro.

La rubrikoj *Notoj*, *Recenzoj* kaj *Oficiala Informilo* kompletigas tiun ĉi enhave riĉan numeron de IJR.

Juristoj, kiuj parolas la Internacian Lingvon, povas fariĝi regulaj membroj de IEAJ. Nejuristoj laborantaj en juraj institucioj povas fariĝi neregulaj membroj, dum ĉiuj aliaj povas aboni la revuon, kiu estas redaktata en facila stilo kaj popularscience. La kotizo por ambaŭ kategorioj de membroj, inkluzive la abonon al IJR, estas 120 aŭstriaĵ ŝilingoj aŭ egalvaloro. La jarabono por nemembroj estas same tiel 120 aŭstriaĵ ŝilingoj.


La kotizojn, abonojn kaj donacojn por la Fondaĵo IJR akceptas la sekretario-kasisto D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio, poŝta ĉekkonto n-ro 1257.845.

ESTONA ESPERANTISTO JUBILEAS

S-ro Eino Loorits fariĝis 70-jara la 4-an de aŭgusto 1979. Malnova Esperanto-aktivulo, loĝanta en Hobart (Aŭstralio), li klarigis multajn kursojn de Esperanto per propra metodo.

Okaze de la jubilea festo, aperis biografia artikolo pri li en grava gazeto. Al pluraj gratuloj ricevitaĵ de nia amiko, ni aldonas la nian plej sincere.

EŬROPO EN STRASBURGO (1949 - 1979)



Alia aspekto de la Eŭropo-Palaco

Estis la 5-an de majo 1949 kiam Strasburgo estis elektita kiel sidejo de la Konsilantaro de Eŭropo fare de la ŝtatestroj tiam kunvenantaj en Londono. Je tiu dato ili subskribis la interkonsenton pri fondo de tiu nova institucio kies celo estis atingo de pli intima unueco inter tiuj eŭropaj ŝtatoj kiuj respektadis la Homajn Rajtojn. Ernest Bevin, la brita Sekretario por Eksteraj Aferoj pravigis tiun ĉi elekton per jenaj vortoj: «Tiu ĉi urbo estis atestanto de la stulteco de homaro kiu klopodis ordigi kverelojn per milito, krueleco kaj detruo. Eŭropo akiris la rajton solvi siajn problemojn en pli civilizita kaj prudenta maniero. Ni opiniis ke ĝuste Strasburgo estas loko plej konvena por la evoluado de tiu ĉi grandega entrepreno en spirito de bona volo».

Tiel montriĝis ke la eŭropa misio de Strasburgo fakte estis destinita de ĝia historio.

La unuaj kunvenoj de la Komitato de Ministroj de la Konsilantaro de Eŭropo, inter kiuj estis la «Patroj de Eŭropo» Robert Schuman, Alcide de Gasperi kaj Paul-Henri Spaak, okazis en la Urbodo-

mo de Strasburgo. En la sama salono de tiu konstruaĵo kunvenis tridek jarojn poste, je la 21-a kaj 22-a de junio 1979, la estroj de ŝtatoj kaj registaroj de la naŭ ŝtatoj-membroj de la Eŭropa Komunumo por la Eŭropa Konsilio.

Krom la Konsilio de Eŭropo kun ĝiaj 21 ŝtatoj-membroj, Strasburgo estas ankaŭ la sidejo de la Eŭropa Komisiono kaj de la Kortumo pri la Homaj Rajtoj, la Eŭropa Junulara Centro, la Centra Komisiono por la Rejn-navigado (la plej malnova Eŭropa organizaĵo), la Eŭropa Scienca Fondaĵo, la Internacia Instituto por Homaj Rajtoj fondita de René Cassin — gajninto de Nobel-Pac-Premio — kaj de la Internacia Fakultato por la Instruado de Kompara Juro.

En januaro 1958 la registaroj de la ses ŝtatoj-fondintoj de la Komunumoj elektis Strasburgon kiel kunvenlokon por la Asembleo kiu fariĝis la Eŭropa Parlamento. Tiu ĉi decido estis konfirmita en 1965.

En julio 1979 Strasburgo havis la honoron akcepti la rekte elektitan Eŭropan Parlamenton, grava paŝo en la historio de Eŭropo kaj en la historio de Strasburgo.

VERDIKTO

- NATURA FLORO:** «Mi vin amas», de Aldo de GIORGI, el Italujo
Subpremio: «Ĉu vi memoras...?», de Julio J. JUANES, el Hispanujo
- JASMENO:** Ne aljuĝita
Subpremio: «Parfumo en la mano», de Josep FERRER SERRANO, el Hispanujo
- VIOLo:** «Preĝo», de Julio J. JUANES, el Hispanujo
Subpremio: «Mi ne volas esti Kaino», de Lina GABRIELLI, el Italujo
- EKSTERORDINARA**
PREMIO: «Norda printempo», de Zora HEIDE, el Danlando
- ORIGINALA PROZO:** «Fetiĉoj kaj fotoj», de Bernard GOLDEN, el Hungarujo
Subpremio: «Izraelo», de Ben-Alter JEHIEL, el Izraelio

Subskribis la Verdiktan Akton:

P. Manuel CASANOVES, CMF, Prezidanto; Salvador GUMA, R. FERNANDEZ JURADO, Juan VELEZ; kaj G. MORA i ARANA, Sekretario.

Rubí, la 30-an de septembro 1979-a

18-aj INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Sub la supra titolo ĵus aperis tre interesa libreto. Kiel indikas ĝia titolo, la verko temas pri la 18-aj Internaciaj Floraj Ludoj okazintaj pasintjare en Tortosa (Tarragona).

Eldonis ĝin, la Eldona Fako de H.E.F., 80 paĝoj, formato 18 × 11,5 cm., broŝurita. Prezo: 200 pesetoj, plus sendokostoj.

Havebla ĉe Eldona Fako de H.E.F. Inés Gastón, Paseo Marina Moreno, 35, 4.º dcha. Zaragoza-1, Hispanujo, aŭ ĉe via Libroŝervo.

Minimuma mendo 10 ekzempleroj, ricevos 25 % da rabato.

«PERSPEKTIVO»

La voĉo de la dana agadgrupo de la Neŭtrala Esperanto-Movado
Ĉu vi konas tiun bultenon? — Juĝu vi mem!

Redaktorino: Rie Krainer, Nørregardsvej 91, DK-2610 Rødovre, Kopenhago, Danlando. Telf. (01) 41.56.15.

Jarabono por «Perspektivo»: 35 d.kr. (jare 10 numeroj).

JUGOSLAVIA
ESPERANTO
REVUO

VOĈO

Jen interesa revuo eldonita de Esperanto societo «Fratoj Ribar».

Ĉefa kaj respondeca redaktoro: Dušan Adnadj.

Redakcio kaj administracio 56227 — Borovo, Skolska ul. 25, Jugoslavio.

Jarabono: 20 germanaj markoj.